1982 marto
75-a jaro
n-ro 915 (3)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Unua Esperanto-kongreso en Hinda Unio

Vi trovos

kelkajn gravajn informojn kaj atentigojn en ĉi tiu numero. Ili, kompreneble, temas pri la Esperanto-movado, ĉar ni supozas, ke ĝi ankoraŭ estas grava por ĉiu unuopa leganto de nia revuo. Ne seniluziigu nin dirante, ke ni eraras pri via koncepto de graveco. Cetere, vi povas ĝuste en ĉi tiu numero ekzameni la redakcian imagon pri movadaj gravaĵoj. Vi rimarkos, ke ni ĉi-foje elstarigas ĉefartikole kunvenon de 25 homoj, kaj vi memoros, ke ni kelkfoje prinotas nur en "Loke – Fake – Persone" alian kunvenon de pluraj centoj da homoj. Vi ja scias, ke graveco kaj grandeco ne ĉiam akompanas unu la alian. Okazis ial, ke pluraj tekstoj ĉi-foje havas redakciajn enkondukojn aŭ finajn notojn. Komprenu tion kiel martan kapricon, se vi volas! Atentu, eventuale, ke ni ne kutimas diri al vi, fine de iu artikolo, ke vi aŭ via movada organizaĵo agu aŭ ne agu simile al la koncerna raporto. Ni ja supozas, ke vi mem diras tion al vi, kiam vi tralegas tekston, kiu povus riĉigi aŭ vigligi vian movadan aktivecon. Ĉu viaj spertoj kaj agadmanieroj foje speguliĝas en ĉi tiu revuo? Se ne, tio povus signifi, ke tiaspecaj raportoj ial ne venas al nia adreso. Ĉu denove kulpas tiuj eternaj poŝtistoj? Salutu de ni tiun, kiu portos al vi ĉi tiun numeron.

Enhavo

41 Unua kongreso de hindaj esperantistoj: Granda novaĵo el Bharato (S.M.)
43 Marĝene de laborplanoj: Kiu estas UEA? (Renato Corsetti)
45 Post dujara restado en Kenjo: Ili ne bezonas la kvinan lingvon (Ian D. Tarrant)
46 Membrostatistiko de UEA: Brazilo unualoke
47 Reagoj: Celaro de Raŭmo montras intelektan bankroton (P. Daŝgupto)
48 Proponoj: Koresponda aŭkcio (Osmo Buller)
49 Instruado: Starta testo (Metodi Pančev)
50 Kalendaro: Kiel elekti: Kion fari? Kien iri? (renkontiĝoj, kongresoj...)
53 Recenzoj: "Tutmonda sonoro" de K. Kalocsay (Gaston Waringhien); "Proverbaro franca-Esperanta" de L. Bougois (W.A.M. van Heugten); "Taschenlehrbuch Esperanto" de T. Dahlenburg kaj P. Liebig (B. de Wit)
55 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
56 TEJO-Paĝo: Junulargastejoj: Trajne al festivalo; Nova eldonaĵo de TEJO: Kio estas NIEO?; 38a Internacia Junulara Kongreso: Pĉk por IJK
57 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
59 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
60 Anoncetoj

La kovrilo

Du sinsekvaj numeroj de nia revuo havas aziajn kovrilojn! Post la ĉina kovrila mozaiko en februaro, jen hinda fota triopo por marto. Ni ne klarigos ĉi-loke, denove, la kovrilajn bildojn, ĉar ilin traktas la enkonduka artikolo de ĉi tiu numero. Anstataŭe, ni jen foje diru, kiel oni gajnas la kovrilan paĝon en ĉi tiu plej vaste legata movada periodaĵo. Nu, se vi mem (jes, ekzistas ankaŭ tiaj!), via klubo, asocio aŭ simile sopiras foje invadi nian kovrilpaĝon, vi devas – minimume – fari ion movade gravan. Tio tamen ne nepre sufiĉas. Vi ankaŭ devas zorgi, ke samtempe iu alia ne faru ion same aŭ eĉ pli gravan. Ankaŭ tio ne sufiĉas. Necesas, ke vian epokfaran atingaĵon fote registru almenaŭ kompetenta amatoro, se jam ne eblas ke tion faru profesia fotisto. La lasta konsilo estas, ke vi agu rapide, ĉar ni ekscese malŝatas neaktualajn fotojn (kaj novaĵojn). La kovrilaj hindoj plenumis ĉiujn ĉi kondiĉojn, tiel skrupule, ke eĉ se la numero estus aperinta tute ĝustatempe, ili ja sidus sur ĝia kovrilo, ĉar la tuta materialo pri ilia kongreso komence de februaro estis ĉe la redakcio jam meze de la monato. Do, ĉu vi, post ĉiuj ĉi atentigoj kaj konsiloj vidas vin en la baldaŭa estonteco sur la kovrilpaĝo de nia revuo? Vi certe havas ŝancojn, des pli, ke la redaktoro malintencas misevolui ĝis tiu malnivelo, kiu permesus al li kovrile publikigi bildojn de si mem, sia onklino aŭ nevo, kion – kiel vi scias – kelkiuj en la Movado foje tamen faras. Bonvenon al nia kovrilpaĝo!

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. **Telefono:** (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). **Fondita** en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,– gld.

Anonctarifo (gld.): 1p. 1000, 1/2p. 530, 1/4p. 290, 1/8p. 170, 1/16p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via delle Cave 82/C, I-00181 Roma, Italio; tel. (06) 78 89 970.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo; tel. (061) 226-8101.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; tel. 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387-8288.

Maandelijks tijdschrift "esperanto", nr. 915(3), maart 1982. Verantw. uitgever: G. Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, België

Granda novaĵo el Bharato

Tra la lastaj jardekoj, multaj klopodoj estis faritaj por starigi firman, organizitan bazon de la Esperanto-movado en Hinda Unio. Fondiĝis en tiu longa periodo pluraj organizaĵoj, kiuj pretendis tutlandecon por ke rapide poste fariĝu klare, ke fakte temis pri lokaj grupoj baldaŭ malaperontaj. En la lastaj du-tri jaroj la Esperanta laboro en ĉi tiu lando grave intensiĝis: ekviglis novaj grupoj en la lando mem, en Japanio ekfunkciis speciala laborgrupo por helpi la Movadon en la aziaj evolulandoj, UEA mem firmigis siajn kontaktojn kun tiu mondparto kaj unuafoje por 1982 fiksis siajn kotizojn ankaŭ en hindaj rupioj kaj malfermis konton ĉe la centra banko de tiu lando. Tra ĉiuj tiuj jardekoj pri kiuj ni parolas, neniam okazis eĉ provo kunvenigi ĉiujn esperantistojn de Hinda Unio. Nun okazis tia renkontiĝo – la unua kongreso de hindaj esperantistoj – kaj ĝi decidis fondi novan tutlandan organizaĵon. Ekzistas pluraj kaŭzoj por kredi, ke temas pri tre grava, mejloŝtona okazaĵo, ke la tiom sopirita firma bazo de Esperanto en Hinda Unio estas starigita aŭ, ke ni estas sur bona kaj ĝusta vojo por starigi ĝin.

A L LA UNUA TUTHINDA Esperanto-Kongreso, inter la 5a kaj 7a de februaro 1982, venis 25 homoj el ĉiuj partoj de la vastega lando. La Kongreso okazis en Vijayawada, urbo situanta en la orienta flanko de la centra parto de la lando. Eble la nombro de la partoprenintoj ne ŝajnas al vi impresa, kvankam ĝi ja estas tia pro pluraj necesaj konsideroj. Unue, en Hinda Unio nun ekzistas nur cento da homoj, pri kiuj oni scias, ke ili iam lernis la Internacian Lingvon kaj iom aktivis aŭ pretis aktivi en la Movado. Due, en Hinda Unio oni ne povas neglekti la distancojn, ĉar tri tagnoktoj apenaŭ sufiĉas por traveturi la landon, ĉu de la okcidento orienten, ĉu de la nordo suden. Tie en Vijyawada, reprezentiĝis – eble plej grave – tri el la antaŭe fonditaj "tutlandaj" Esperanto-organizaĵoj kaj pluraj el la lokaj grupoj kaj antaŭe nekonataj kernoj. Temis do, ne pri turisma/labora kunveno, simila al la kutimaj movadaj renkontiĝoj, sed pri kongreso de delegitoj kaj reprezentantoj de la plimulto de la hindaj esperantistoj.

Post zorga analizo de la nuna stato kaj bezonoj de la Movado en Hinda Unio, la Kongreso decidis fondi novan organizaĵon. Ankaŭ ĝia nomo sonas tute (kaj iom tro) nove: Federacio Esperanto de Bharato (FEB). Bharato tie ne simple signas provon esperantigi la propran nomon de la lando, komunan al pluraj hindaj lingvoj, sed ĝi sugestas ankaŭ tiun grandskalan evolulandan konsciiĝon pri la propraj identeco kaj valoroj, tiun emon mem nomi sin anstataŭ konservi la truditajn nomojn el la pasinteco.

FEB (kiun ni pli volonte nomus "Federacio por Esperanto en Bharato" aŭ "Federacio Esperanta de Bharato") ne fondiĝis por anstataŭi la ĝisnunajn E-organizaĵojn en Hinda Unio sed por kunligi ilin, por difini iliajn specifajn taskojn en la hinda Esperanto-movado. Tiel jam la Kongreso en Vijayawada parolis pri la lokaj filioj, kiel "FEB en Kalkato", "FEB en Nova Delhio".

Tiuj filioj fakte jam ekzistas, ĉar en tiuj lokoj jam troviĝas du el la antaŭe fonditaj organizaĵoj. En la federacia ĉefurbo Nova Delhio estas la sidejo de Hinda Instituto de Esperanto (Post Box 604, New Delhi 110 001), la plej malnova el la nun ekzistantaj movadaj kernoj en la lando, fondita antaŭ 20 jaroj, ĉefe kiel



Kunveno en Vijayawada: Hindaj esperantistoj ekzamenas siajn proprajn fortojn kaj planas la estontecon de Esperanto en Hinda Unio.

rezulto de la laboro de la forpasinta Madeleine Haudebine el Francio, kiu dum jardeko kaj duono provis disvastigi la Internacian Lingvon en Hinda Unio. Laŭ interkonsentoj en la fondkunveno de FEB (kie ĉeestis la sekretario de la Instituto, s-ro B.R. Tulsyani), FEB en Nova Delhio okupiĝos estonte i.a. pri la funkciigo de libroservo por hindaj esperantistoj.

Bazo de la alia filio, FEB en Kalkato, estas Hinda Unia Esperanto-Asocio, fondita antaŭ du jaroj kaj tre aktiva sur la informa laborkampo en tiu multmiliona bengala ĉefurbo. S-ro Swaraj Chakravarty, unu el la plej aktivaj hindaj movadanoj en la lastaj jaroj, prezidanto de tiu organizaĵo en Kalkato, mem ne sukcesis iri al Vijayawada sed tien venis sekretario de Hinda Unia Esperanto-Asocio, s-ro S.S. Pal.

En Vijayawada mem ĝis nun ekzistis Esperanto-Ligo por Hindujo. Tiu organizaĵo kaj ĝia ĉefa animanto, d-ro P.V. Ranganayakulu (23-jara nova entuziasmulo), faris la bazan iniciaton pri la kunvenigo de la Unua Tuthinda Esperanto-Kongreso kaj plenumis, kun helpo de aliaj lokaj geesperantistoj, la ĉefan parton de la ampleksa organiza laboro. Ĉiuj partoprenintoj de la Kongreso unuanimas pri la altnivela kvalito de tiu laboro.

Ni supozas, ke la sufiĉe centra situo de Vijayawada instigis la Kongreson decidi, ke tiu loko estonte rolu kiel sidejo de Federacio Esperanto de Bharato. Tiurilatan influon certe havis ankaŭ la fakto, ke disponeblas lokaj laborfortoj kaj, ke malnova simpatianto de Esperanto, s-ro Lavanam (kiu antaŭ kelka tempo vizitis ankaŭ la Centran Oficejon de UEA), promesis malavaran helpon de la sukcesa sociserva organizaĵo, kiun li gvidas. Temas pri la t.n. Ateista Centro, kies sidejo funkcios ankaŭ kiel adreso de FEB (c/o Atheist Centre, Benz Circle, Vijayawada, A.P., Hinda Unio). Tiu centro helpos ankaŭ la eldonadon de dumonata bulteno de hindaj esperantistoj, kiun redaktos s-roj Daŝgupto kaj Tulsyani. Ĉi-monate en la centro komenciĝos nova Esperanto-kurso, kiun partoprenos i.a. pluraj gvidantoj de tiu socia organizaĵo.

Kompreneble, FEB elektis en Vijayawada ankaŭ sian estraron. S-ro K.V. Nath, multe vojaĝinta kaj sperta esperantisto, antaŭa altranga funkciulo de la hinda fervoja sistemo, fariĝis la unua prezidanto de FEB. D-ro Probal Daŝgupto, juna lingvisto jam bone konata en la Esperanto-movado (i.a. pro multjara kunlaboro en ĉi tiu revuo), transprenis la postenon de vicprezidanto, dum d-ro P.V. Ranganayakulu, organizinto de la Kongreso, estos la sekretario de FEB. La kasisto fariĝos s-ro V. Adinarayana, kaj en la estraro membros ankaŭ d-ro F.S. Abdul Salam kaj s-roj: R.N. Dubey, S. John Bosco, S.S. Pal, S.V. Pimpalkhare, J.N. Sharma kaj B.R. Tulsyani.

Se juĝi laŭ granda svarmo de raportoj, kiuj – tre rapide! – atingis nin, la estraro de FEB ankoraŭ povas kompletiĝi per reprezentantoj de la lokoj, kiuj ne sukcesis sendi delegitojn al la fondkunveno en Vijayawada. Krome, oni antaŭvidas, ke la rolo de ĉi tiu estraro estu iom specifa, direktita unuavice al la firmiĝo de la organizita Esperanto-movado en Hinda Unio. Unu el la decidoj de la Kongreso en Vijayawada preskribas, ke plej malfrue fine de 1983 okazu nova kongreso de FEB kaj ke ĝi elektu novan gvidorganon de la Movado en ĉi tiu lando. Tian decidon, kiu limigas la mandaton de la unua estraro de FEB al proksimume du jaroj, oni povas nomi prudenta kaj serioze motivita.

Eventuale, al iuj legantoj ekŝajnos, ke ni troigas donante tiel ampleksan spacon kaj la ĉefan lokon en ĉi tiu numero al okazaĵo kiu kunvenigis nur 25 homojn. Sed temas ĉi tie pri tiu "kvalito de la kresko", kiun ĝuste unu el la agintoj en Vijayawada, Probal Daŝgupto, aludas sur unu el la postaj paĝoj de ĉi tiu numero. Temas pri la fakto, ke la Kongreson en Vijayawada iniciatis, preparis kaj efektivigis la hindoj mem. Tie ĉeestis nur unu eksterlandano, la juna svedo Per Sjödin, kiu rolis kiel observanto kaj al kiu ni dankas ĉiujn fotojn akompane al la granda novaĵo el Hinda Unio. Ni devus kompreni, ke la Internacia Lingvo akiros firman grundon en novaj landoj nur tiam, kiam ni tie havos lokajn homojn, kiuj konsistigos la ĉefan agadkernon. Post multaj jardekoj da pena klopodado, tio nun en Hinda Unio ŝajnas survoje al sukceso.

sm

Ili gvidos la hindan Esperanto-movadon (de maldekstre): P.V. Ranganayakulu, P. Daŝgupto, K.V. Nath kaj s-ino Saranath

MARĜENE DE LABORPLANOJ:

Kiu estas UEA?

En la pasintjara Estrara Raporto, en la ĉapitro pri la landa agado, restis pluraj esprimoj kaj juĝoj, kiuj provokis viglajn – por ne diri protestajn – elpaŝojn de diskutantoj en la kunveno, kiu en Brazilo traktis la raporton. Ni povus nun diri, ke pri tio kulpas d-ro Corsetti, estrarano pri tiu fako. Tamen, ni ne opinias, ke temis pri kulpo sed pri merito. Cetere, eblis redakcie kribri tiun ĉapitron, tiel ke en ĝi ne restu – ni diru pro "teknikaj" kialoj – la koncernaj kvalifikoj kaj prijuĝoj. Ni ne faris tion. Ni nun simile rilatis al la ĉi-sekva teksto de d-ro Corsetti, kiu atakas kelkajn mitojn kaj antaŭjuĝojn pri UEA kaj en UEA. Li faras tion vigle, kuraĝe kaj – sprite, kio estas ĵurnalisme necesa kvalito, ofte mankanta ĉe tiuj, kiuj verkas pri la t.n. seriozaj temoj.

MIA INTERESIĜO pri organizaj demandoj de la Esperanto-movado, kaj aparte pri rilatoj inter UEA kaj ĝiaj landaj asocioj dum la lastaj jaroj, konvinkis min, ke ekzistas ankoraŭ pluraj fundamentaj temoj, kies konturoj ne estas klaraj en niaj mensoj. Ni, en ĉi tiu kunteksto, estas la pli aktivaj funkciuloj de la Movado, la daŭraj partoprenantoj de Universalaj Kongresoj, la komitátanoj, la estraranoj de landaj asocioj ktp. Kaj, se tiaj temoj ne estas klaraj por ni, kiel ili povas klari por la membro de la Esperanto-klubo de Pfaffenheim-sur-Danubo?

Estas bone debati inter ni pri kelkaj tiaj fundamentaj demandoj antaŭvide al – kaj marĝene de – la nun prilaborata kvinjara laborplano de UEA kaj la agadprogramo por la jubileo en 1987. Nur kiam la vortoj de nia komuna lingvo signos por ĉiuj komunajn konceptojn, ni kapablos ne misinterkompreniĝi kaj ni povos komune decidi kaj agi.

Unu el la tute malklaraj konceptoj, kiuj vagas tra la Movado, estas tiu kunligita al la trivokalaĵo UEA. Kio ĝi estas? Aŭ pli precize: kiuj homoj estas UEA? Ĉu laborplano de UEA estas plano pri la laboro de ĝia estraro? Ĉu jarraporto de UEA estas raporto pri la stato de Esperanto tra la mondo aŭ listo de la leteroj diligente senditaj de la ĝenerala sekretario de UEA kaj – malpli diligente – de la ceteraj estraranoj?

Mi donas ĉi-sekve mian starpunkton, respondante demandojn, kiuj estis efektive faritaj. Espereble la legantoj iel reagos, ĉu en ĉi tiu revuo, ĉu alirevue.

Ĉu UEA estas la Centra Oficejo en Roterdamo?

Ne! Dum longa tempo Roterdamo estis – por reuzi ŝablonan metaforon – la umbiliko de la mondo. En tiu periodo la UEA-oficejo en Roterdamo estis la administra centro, ĉirkaŭ kiu turniĝis la agado de UEA. Ĝi estis la funkciloko de la libroservo de UEA kaj la kunsidloko de ĝia estraro.

Bonŝance en la lastaj jaroj multiĝis UEA-oficejoj en aliaj urboj (Antverpeno, Nov-Jorko, Budapeŝto) kaj en baldaŭa estonteco ni esperas havi pliajn oficejojn (almenaŭ unu en ĉiu mondoparto). Sufiĉas tio en si mem por igi la glorŝarĝitan oficejon en Roterdamo malpli "centra", kaj malpli totalece reprezenta por la oficeja potencialo de UEA.

La oficistoj en Roterdamo restas certe unu el la laborkolonoj de UEA. Sed ilia agado celas nur bone administri la membrojn, liveri al ili la revuon, jarlibron, katalogon, plenumi iliajn libromendojn, libroteni, organizi kaj teknike prizorgi Universalajn Kongresojn, reagi al informpetoj kaj korespondi pri ĉio ĉi.

Plion oni ne atendu de ili, kaj certe oni ne atendu, ke ili trovu la tempon por "disvastigi Esperanton tra la mondo". En la ekstermovada mondo oni ne atendas ke militojn gajnu sur la batalkampoj oficistoj de militministerioj, por uzi "pracelanan" metaforon – kiel dirus la subskribintoj de la manifesto de Raŭmo (v. nian februaran numeron).

Do, laborplano de UEA havas tute konkretajn sekvojn por la laboro en la centra kaj en la ceteraj oficejoj, sed ĝi ne unuavice celas ilin.

Ĉu UEA estas la Komitato?

Ne! Malgraŭ tio, kion asertas pluraj maliculoj, la Komitato ne celas provizi idealajn kondiĉojn por dumkongresa supera konversacia kurso. Ĝi estas la ĉefa decidorgano de la Asocio. Ĝi devus funkcii kiel nia "parlamento". Ĝi estas la loko, kie oni devus alpreni strategiajn decidojn pri la agaddirekto de la tuta Asocio (inkluzive de la Estraro kaj de la oficejoj, kies taskoj nur celas plenumi komitatajn decidojn). Ĝi estas organo vaste reprezenta, kie la opinioj kaj la postuloj de la diversaj movadaj partoj havas okazon por konfrontiĝi inter si kaj veni al sintezo. Interalie – nur por doni ekzemplon – estas la Komitato, kiu decidos, ĉu en la venonta laborperiodo oni dediĉu sian energion por persvadi Uneskon aŭ por persvadi kelkajn pliajn milojn da neesperantistoj iĝi komencantoj.

Neniu lasu sin misgvidi de la malbona funkciado de kelkaj komitataj sesioj kaj de la sentebla emo de la

ĈU LA APRILA NUMERO DE LA REVUO MALTRAFOS VIAN ADRESON? SE VIA PAGO (ABONO) ANKORAŬ NE VENIS, MANKOS LA APRILA!?

komitatanoj fuĝi de strategiaj demandoj (tro malfacilaj) kaj rifuĝi en debatadon pri neceso de voĉdono, por decidi, ĉu voĉdoni pri aldono de sesa pinto al la stelo, kiel videbla signo de nia progreso.

Neniu lasu sin misgvidi de ankaŭ ĉe ni malbone efikanta parlamentismo, por rifuzi al la parlamento ekzisti kaj strebi al bona funkciado.

Kompreneble, la komitatanoj estas aŭ devus esti la pintaj aktivuloj en la landaj movadoj kaj, kiel tiaj, ili estas, ekster la UK-tempo, inter la plej grandaj laborantoj por plenumo de la propraj decidoj. Krome, ili funkcias kiel relajso inter la internacia kaj la landa movadoj. Pro tio ilia konvinkiĝo kaj kunagado estas necesa por ĉia laboro. Tamen, oni ne aprobas laborplanon pensante pri tiuj kelkaj dekoj da homoj.

Ĉu UEA estas la Estraro?

Ne! Ni bonŝance jam de longa tempo transiris tiun sojlon, trans kiu ne plu eblas identigi unu aŭ kelkajn homojn kun nia afero. Ni jam estas vasta movado el kies sino pretas veni la homoj, kiuj pleje reprezentas la movadajn tendencojn kaj bezonojn en difinitaj momentoj. Homoj estas estaĵoj tre limigitaj vivtempe, laborkapable, kaj ideoŝanĝe. Komunumoj, kiel la esperantlingva, estas tiel komplikaj kaj ŝanĝiĝemaj, ke neniu homo povas daŭre respondi al ties bezonoj. Pro tio, oni rigardu al la estraranoj de UEA, kiel al la ĉefaj servantoj de la komunumo, kiuj utilas por resumi la bezonojn kaj difini ilin en formo akceptebla por ĉiuj. Ili ne estas la absolutaj reĝoj, kiuj decidas kaj ordonas kion kaj kiel fari. Ili utilas kiel kunordigantoj kaj plenumantoj de difinitaj reprezentaj roloj, kiuj ja devas ligiĝi al difinitaj homoj de konfido. Ili estas pli aŭ malpli brilaj, pli aŭ malpli laboremaj, pli aŭ malpli konvinkitaj ke ili ja estas UEA, sed ili ne estas UEA.

Se oni atendas ke ili venkigu Esperanton, oni vane atendas. Ili maksimume kapablas pretigi kortuŝan festparoladon por esprimi la sentojn de la homoj, kiuj venkigis Esperanton.

Grégoire Maertens (maldekstre): Ĉu UEA estas la prezidanto? Ne! Li estas nur ĝia ĉefa reprezentanto kaj servanto.

Ĉu UEA estas la individuaj membroj?

Jes, sed ne nur! UEA estas "originala" organizaĵo, kiam temas pri membreco. Unuflanke ĝi estas internacia organizaĵo kun landaj asocioj, kies anoj estas membroj de la internacia asocio (kaj tiu estas la normala modelo de internacia organizaĵo). Aliflanke ĝi havas duan, tre vivnecesan, membrokategorion, la individuajn membrojn. Temas pri la homoj, kiuj rekte aliĝas al ĝi, kaj finfine liveras al ĝi grandegan proporcion de ĝiaj financaj rimedoj, sen kiuj UEA en la nuna epoko tute ne kapablus ekzisti kiel vere sendependa organizaĵo.

Ĉi tiuj membroj regule ricevas la revuon de la Asocio, kaj ili ĝenerale estas inter la plej fidelaj kaj informataj anoj de la Asocioj. Ĝenerale, ili sentas lojalecon al UEA preter la lojaleco al sia landa organizaĵo kaj ili ofte pretas transpreni laboron komisie de UEA, laboron internacian, kiu devas esti plenumata zorge de la centraj instancoj de la Movado.

Krome, ili estas inter la plej pretaj agantoj de landaj asocioj kaj lokaj kluboj. Estraranoj de landaj asocioj ne kapablas bone plenumi sian enlandan laboron, se ili ne ricevas la samajn informojn, kiujn ricevas la individuaj membroj, kaj ekzistas neskribita morala regulo, kiu devigas estraranojn de landaj asocioj, se ili nur finance povas, iĝi individuaj membroj de UEA.

Certe, kiam oni skribas: "UEA devas fari tion aŭ alion", oni aludas la individuajn membrojn de UEA. Kiam oni verkas laborplanon, oni havas antaŭ si la laborpotencialon de ĉi tiuj miloj da membroj. Oni ne devas supertaksi tiun potencialon, sed oni nepre devas konsideri ĝin.

Ĉu UEA estas la landaj asocioj?

Jes! Ne eblas nei, ke la ĉefaj portantoj de la esperanta laboro en la nuna momento estas la landaj asocioj kun siaj lokaj kluboj kaj ties membroj. La Movado – kaj UEA – estas forta kie ekzistas funkcikapabla landa organizaĵo. Ĝi vegetas (eŭfemisme: stabilas), kie la landa organizaĵo ne bone funkcias.

Ĉi-rilate necesas tuj forigi ideon, kiu – malgraŭ sia absurdeco – pluvivas en pluraj mensoj. Ne ekzistas konkurenco inter UEA kaj landaj asocioj. Ne ekzistas la pronomoj "ni" kaj "ili", kiam parolas unu pri la alia. Temas ĉiam pri ni. UEA ja havas la devon enmiksiĝi en la internajn aferojn de la landaj asocioj, kiam ĉi tiuj ne kontentige funkcias, kiam ilia membronombro restas "stabila", kiam ili laboras en tute sensukcesaj manieroj ktp. UEA havas tiun devon, ĉar ĝi havas la

devon (antaŭ ĉiuj aliaj landaj asocioj) certigi ekvilibran disvastigon de Esperanto en ĉiuj landoj. (Cetere, ĉe ni neniu ĝis nun svingis la sloganon "Esperanto en nur unu landon", ĉar ĝi estas absurda; la historio pruvis, ke tio absurdas ankaŭ alikampe.)

Landaj Asocioj estas ja suverenaj kaj ili restu tiaj, sed ilia rajto je suvereneco finiĝas kiam finiĝas ilia kapablo plenumi siajn celojn.

Aliflanke, landaj asocioj ja havas la devon enmiksiĝi en la internajn aferojn de UEA. Ili ne permesu ke UEA fariĝu ia fermita Internacia Roterdama Esperanto-Klubo. Ili enketu, ili postulu. Ili sendu al la komitat-kunsidoj la plej brilajn homojn, kaj ne funkciulojn, kiujn oni deziras konsoli pro perdo de pli gravaj en-landaj postenoj. Ankaŭ la ekzistorajto de UEA finiĝas tie, kie ĉesas ĝia kapablo respondi al la servopetoj de landaj asocioj.

Necesas ankaŭ forigi alian ideon, kiu vivas kaj prosperas en aparte brilaj mensoj, kiuj renkontis mal-facilaĵojn kunlabori kun siaj landaj asocioj, kaj el tio konkludis, ke landaj asocioj estas senutilaj kaj ke oni povas bone vivi sen ili.

Mi estas firme konvinkita, kaj mi ŝatus refuton, ke en la nuna momento ni ankoraŭ dum longa tempo bezo-nos organiziĝon je landa nivelo, ke ni bezonos landajn kongresojn, eldonantojn de nacilingvaj lernolibroj, eldonantojn de landaj klub-adresaroj, kolektantojn de kotizoj ktp. Tiuj samaj brilaj homoj (cetere tre pli sim-patiaj al mi ol pluraj estraranoj de landaj asocioj) ja uzas la ekzistantajn landajn asociojn kaj ties revuojn por vendi siajn brilajn kulturajn produktojn. Al kiuj ili parolus, se ne ekzistus tia organiz-reto?

Nu, finfine – por ne pli longe tedi la legantojn (kvan-kam en "malfacilaj" numeroj de ĉi tiu revuo oni ja rajtas laŭ mia imago) – la respondo al la demando "Kiu estas UEA?" por mi tekstas: la homoj organiz-itaj en la landaj asocioj kaj la individuaj membroj. Por ili ni faru niajn laborplanojn.

Renato Corsetti,
estrarano pri planado

POST DUJARA RESTADO EN KENJO:

Ili ne bezonas la kvinan lingvon

La juna brito Ian D. Tarrant pasigis en 1978/79 tutan jaron en la Centra Oficejo de UEA kiel volontulo. Tuj poste, en aŭgusto 1979, li iris volontuli kiel instruisto en Kenjo kaj restis tie du jarojn. Li nun plustudas en Britio kaj denove aktivas kiel estrarano en TEJO. Ankaŭ ni starigis al li la demandon per kiu komenciĝas la suba teksto. Ni trovas lian raporton tre interesa kaj instrua. Ĝi montras, ke la argumentado favore al Esperanto ne povas esti sama en ĉiuj landoj kaj medioj, ke necesas studi la lokajn kondiĉojn kaj bezonojn, por sukcese nuancigi kaj diversigi nian informan laboron.

Utilaj spertoj de dujara restado en Afriko: Ian D. Tarrant

"NU, ĈU VI SUKCESIS starigi Esperanto-grupon en Kenjo? " Tiel demandas esperantistoj de post mia reveno al Eŭropo. Bedaŭrinde – sed honeste – mi devas respondi nee. Kial, do?

Dum momento, mense venu kun mi al Kenjo, al la lernejo kie mi instruis fizikon kaj matematikon. Ni alvenas la flughavenon de Najrobo. Tie ni legas kaj aŭdas anoncojn kaj svahile kaj angle, t.e. en respektive la **nacia** kaj **oficiala** lingvoj. Tamen, en la stratoj de la ĉefurbo Najrobo mem, ni aŭdos "duaklasajn" lingvojn, tiujn de la unuopaj triboj: gikuja, ĝalua, kamba ktp.* Se oni iras per buso, trajno aŭ amas-taksio ĝis la okcidenta parto de la lando, plej utilas la svahila, por aĉeti bileton, peti klarigon aŭ akiri manĝ-eton survoje. Sed, ne tro zorgu pri la gramatiko! Tio estas afero nur de la radio, de ĵurnaloj kaj de la ŝtato Tanzanio, kaj cetere eble la homoj ne komprenos bonan stilon!

Se estos mardo kiam ni venos al mia vilaĝo, ni vidos bazaron apud la lernejo. Tie, pleje aŭdeblos la lingvoj ĝalua kaj luhja, ĉar ni troviĝas en limzono inter tiuj du triboj. Ne estas malfacile tie ĉi trovi homojn, kiuj komprenas nek la nacian nek la oficialan lingvon de Kenjo. Sed, nun ni eniru la lernejon, kie aferoj estas aliaj.

Ĉiu fako, krom la svahilaj lingvo kaj beletro, estas instruata per la angla, ĉar la ŝtataj ekzamenoj estas verkitaj kaj respondendaj en tiu lingvo. Vi povus el

* Miajn esperantigojn de tribaj nomoj oni ne konsideru definitivaj.

tio prave konkludi, ke ĉiu mezlernejano studas per sia tria aŭ kvara lingvo. En kiom da eŭropaj landoj oni tolerus tion? Kompreneble, por progresi la lernantoj devas vere lukti kun siaj libroj. Kaj pro tio ke la lingvoscio tiom gravas, sed tamen estas neadekvata, la lernejestro insistas pri konstanta uzo de la angla kaj la svahila, kaj malpermesas ĉiujn aliajn lingvojn, ne nur klasĉambre, sed ankaŭ dum sporto, en la manĝejo, en dormejoj, ĉie.

Do, Esperanto estas malbonvena. Cetere, kial la kenjanoj lernu Esperanton? Ili ne havas monon por vojaĝi al (por ili) ekzotikaj landoj de Eŭropo, ekzemple. Ili ne atendas vizitantojn el tiuj landoj; ili ne havas grandan deziron korespondi kun fremduloj (krom se tio alportos financan avantaĝon); jam vasta gamo da literaturaĵoj alireblas per la angla... Do, kial? Multe pli avantaĝe estas plibonigi la jaman konon de la angla ol eklerni novan, apenaŭ utilan lingvon.

Por tio ni havas niajn movadajn kontraŭargumentojn: Ni diras, ke la angla estas lingvo de imperiismo, antaŭa kaj nova. Ni asertas, ke la angla katenas la kenjanojn al anglaj pensmaniero kaj kondutnormo. Ni emfazas, ke ne la tuta mondo ekster Kenjo parolas la anglan, ke per Esperanto ili apartigus sin de la koloniismo kaj usoneco kaj aliĝus al internacia, interkultura komunumo de sendiskriminacia komunikado. Sed tia argumentado sonas mallaŭte tie. Kvankam la homoj sentas la lingvajn atencojn kontraŭ si, ili ne mense konscias pri ili. Ni devas trapenetri la dikajn murojn konstruitajn de jardekoj da propagando, laŭ kiu la angla estas la plej lerninda lingvo, jam internacia kaj ĉie konata.

Tion klopodas fari UEA per sia reklamkampanjo. En Kenjo ĝis nun ni kvinfoje aperigis en svahila ĵurnalo anoncon, kiu petas interesitojn pri lingvaj problemoj kaj kultura imperiismo, anonci sin al Roterdamo por ricevi la svahillingvan broŝuron *Kwa kulinda tamaduni za Afrika* (Por defendo de afrikaj kulturoj). Jam respondis plurdeko da homoj el diversaj regionoj de Kenjo. Krom sendi la broŝuron, la Komisiono pri Landa Agado de UEA leteras al ĉiu, kaj lastatempe sendis cirkuleron "Esperanto en Afriko". La anonco baldaŭ aperos denove, almenaŭ dufoje.

Ian D. Tarrant

MEMBROSTATISTIKO DE UEA:

Brazilo unualoke

LA INFORMOJ pri la membraro de UEA en 1981, kiuj aperis en nia februara numero (p. 39), kaŝas kelkajn interesajn faktojn, kiujn ni ne elstarigis pli frue. Krom tio, ke la suma membronombro estis rekorda, ŝanĝiĝis – almenaŭ provizore – iuj kutimaj trajtoj de la tradicia membrostatistiko. Unuafoje en la historio de la Asocio, ekstereŭropa lando – Brazilo – havas la plej grandan nombron de individuaj membroj de UEA. Jen du tabeloj kun po dek landoj, laŭ la plej granda nombro de individuaj membroj (maldekstre) kaj membroj entute – asociaj kaj individuaj (dekstre):

1. Brazilo	639	1. Bulgario	5194
2. Francio	582	2. Pollando	4303
3. FR Germanio	480	3. Hungario	3237
4. Svedio	445	4. Ĉeĥoslovakio	2331
5. Nederlando	418	5. Italio	1722
6. Usono	408	6. Japanio	1639
7. Japanio	342	7. Francio	1490
8. Britio	338	8. Belgio	1485
9. Italio	242	9. Svedio	1434
10. Finnlando	229	10. Brazilo	1264

En la maldekstra tabelo (pri la individua membraro), vi rimarkas krom Brazilo du pliajn ekstereŭropajn landojn – Usono kaj Japanio. Ĉu ĉiuj ĉi tri landoj nur hazarde estas ĝuste la solaj ekstereŭropaj landoj en kiuj en la ĝisnuna historio okazis Universalaj Kongresoj? Ŝajnas, tamen, ke tie ne temas pri hazardo kaj ke necesas rekoni la gravegan rolon, kiun la kongresoj ludas en la stimulo de la loka kaj landa Movado.

Se vi komparos la sumojn de la individua membraro kaj de la membraro entute en la ĉi-supraj tabeloj (4123 kaj 24099) kun la koncernaj finsumoj de la kompleta statistika tabelo (6745 kaj 36555) vi konstatos – en ambaŭ kazoj – ke 65% de la membraro de UEA vivas en la landoj de la du supraj tabeloj.

Pri la rekordo de Brazilo denove: Estas malfacile kredi, ke la lando de la 66a Universala Kongreso sukcesos longe teni sian honorlokon pri la individua membraro. Temas i.a. pri transpagaj problemoj, kiujn pasintjare solvis la Kongreso. Temas antaŭ ĉio pri malunueco de la landa Movado en tiu lando, kiu permesas al si la lukson havi tri landajn organizaĵojn (Brazila Esperanto-Ligo, Kultura Kooperativo de Esperantistoj – ambaŭ aliĝintaj al UEA – kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto). Oni povus paroli eĉ pri kvar tutlandaj movadaj organizaĵoj, se oni aldonas la viglan junularan sekcion de TEJO, Brazila Esperantista Junulara Organizo. Tiun malunuecon la Kongreso ne solvis. Eble ĝi ja influos ĝin pozitive, ĉar la Estraro de UEA decidis, ke parto de la antaŭvidebla profito de la Kongreso povos esti elspezita nur konsente inter la tri landaj organizaĵoj.

Cetere, kiam ni en la pasinta numero (p. 38) anoncis, ke la kasisto de la 66a UK en Brazilio, s-ro Carlos A.S. da Cunha, fariĝis la nova prezidanto de Brazila Konsilantaro de Esperanto, mankis spaco por tie mencii, ke s-ro Cunha almenaŭ ĝis nun aktivis en ĉiuj tri landaj organizaĵoj en Brazilo. Eble ankaŭ tio ludos rolon survoje al la unuiĝo de la Esperanto-movado en la rekorda Brazilo.

Celaro de Raŭmo montras intelektan bankroton

Kiam d-ro Corsetti fine de sia artikolo en nia februara numero (p.21) invitis "al debatado pri la fundamentaj ekzistokialoj de la Movado kaj pri la ĝusteco de niaj agaddirektoj", ankaŭ ni – implicite, per la publikigo de tiu invito – aliĝis al la instigo. Ni komprenis tiun inviton tiel kiel ĝi estis formulita, kaj ne kiel instigon al vasta kaj elĉerpa analizado de la t.n. manifesto mem de Raŭmo. Nun d-ro Daŝgupto iel kompromisas pri tiuj du diskutaj elirpunktoj. Li prave bagateligas la pretendojn pri la graveco de la raŭma dokumento. Ĝuste pro tiaj kialoj ni siatempe decidiĝis ne aperigi la manifeston, des pli ke ĝi ne estis dokumento de la TEJO-kongreso en Raŭmo sed unu el tiuj privataj iniciatoj, kiuj celas pli enfokusigi la iniciatintojn ol la temojn. Cetere, reagoj al la raŭma inventaro de ideoj troviĝis ankaŭ en la artikoloj de Baldur Ragnarsson en niaj pasintjaraj numeroj de aprilo kaj decembro.

RENATO Corsetti kaj la redakcio de ĉi tiu plej ĝenerala movada revuo ebligis la lanĉon de ĝenerala debato pri la manifesto de Raŭmo (kies tekston oni legu sur p.6 de *Kontakto* n-ro 69, 1981:1).

Probal Daŝgupto (dekstre), post multjara provo funde intimiĝi kun la lingvo, nun komencas mediti pri la Movado.

Corsetti sendube tro pozitive rilatas al la dokumento. Kaj li tro indulgeme eĥas la supozon de la nuna TEJO, ke ĝi efektive heredis la "socian engaĝiĝon, kiu originis en Tyresö", kaj kiu laŭ Corsetti "fariĝis parto de la esperantista idearo". La tradicio konstante kaj akumule esplori pri konkretaj lingvaj maljustoj, kiun la generacio de Corsetti en sia juno lanĉis, fakte tute malaperis kaj estas forgesita. La fortika verda organismo de Esperantujo, pri kies dinamika nekonscio iam niaj poetoj, psikologoj kaj sociologoj kunaŭtoros epopean bildon, sukcesis foraprobi tiun konkretan tradicion, kaj ne nur eksrevoluciigi la generacion de Corsetti sed eĉ heredigi tiun eksrevoluciecon al la posta TEJO. La verdeco de la "diaspora lingva minoritato" estas pli forta ol ideoj kaj ideantoj. Ĝis seriozaj gejunuloj komprenos ĉi tiun masivan sed komplikan fakton, facilanime sekvados sin tiaj "alvoko de Tokio", "deklaro de Pfaffenheim" k.s. pri kiaj Corsetti, ial pozitive, revas, sen ke iu ajn el tiuj avangardoj sukcesus postlasi efektivan heredaĵon.

Necesas kompreni la forton kaj karakteron de la Esperanta komunumo; analizi ĝian internan politikon kaj la personeco-tipojn, kiujn ĝi produktas kaj roligas; demandi sin pri ĝia vivmaniero, pri ĝia sinteno al sia diverseco, kaj pri la idealo kaj efektivo de ĝia apogado de malgrandaj lingvoj (de kiuj?) kontraŭ sufoko (direktata kiel? fare de kiuj? lige kun kiaj nelingvaj sufokoj?). Sen tia analizo, vera manifesto ne ekzistas. "**La** manifesto", al kiu Corsetti artikolkomence aludas*, enhavas tian analizon. **Kun** tia analizo, ideoj havas **iomete** da eblo fariĝi, ne pli fortaj ol sia socia bazo, sed kapablaj funkciigi elektitajn fortojn kontraŭ maldezirataj fortoj.

La celaro de la manifesto de Raŭmo montras intelektan bankroton fare de tre inteligentaj homoj. La cellisto sukcesis maltrafi la (a) enmovadan **kvaliton de kresko** kaj (b) ekstermovadajn **fortojn, kiuj profunde ŝanĝas la mondan fonon** – parencajn aferojn. Inter (b) troviĝas la plifortiĝo de la neokcidentaj socioj, de la media movado, de virinoj, de la valoroj de la ordinara vivo. Inter (a) troviĝas la kresko de ligoj inter Esperanto kaj tiuj socioj, movado, virinoj kaj valoroj. Sen rekta alfronto al tiaj novecoj, kriado pri "**nov**tipa internacia kulturo" povas nur temi pri... "**kongresoj** kiel vojo al kresko". Novaj ideoj? Ve!

Mi konsentas kun tio, kion la manifesto subkomprenigas (sed ne kuraĝas diri) pri la bezono, kiun evidente multaj esperantistoj persone sentas, pragmatisme uzi la anglan, sed en ĉiu momento kolerboli pri ĝia imper-

* Temas pri la *Manifesto* de Marx kaj Engels el 1847.

PROPONOJ:

Koresponda aŭkcio

LASTATEMPE iom ekpopulariĝis aŭkcioj de libroj kaj aliaj esperantaĵoj, ekz. tiu ĉe la stokholma UK estis tre sukcesa. Tio ĉi estas komprenebla, ĉar pli kaj pli da esperantistoj konscias pri la graveco de la Esperanta kulturo. Tial multaj el ni volas kolekti kaj konservi malnovajn produktojn de nia kulturo.

Ekz. la filatelistoj okazigas aŭkciojn jam de longe. Ili aranĝas ankaŭ perpoŝtajn aŭkciojn, ĉar ja ne ĉiu povas frekventi aŭkciejojn. Same estas – eĉ pli malfacile – ĉe ni esperantistoj, ĉar nur malgranda ono de ni ĝojas regule partopreni kongresojn kaj aliajn aranĝojn, ĉe kiuj oni eble aŭkcias. Kial do ankaŭ ni ne provu okazigi perleteran aŭkcion?

UEA (ĝia libroservo? aparte nomita komisiito?) povus esti la kunordiganto de la aŭkcio. Esperantistoj sendu liston de siaj vendotaĵoj kun indikoj pri la minimumaj prezoj. La prizorganto de la aŭkcio rajtu je makleraĵo.

Tia aŭkcio prezentus ankaŭ ŝancon por esperantistoj kun transpagaj problemoj. Por la mono de la vendaĵoj ili ja povus aĉeti novajn librojn.

Osmo Buller

REDAKCIA NOTO: Ankaŭ la aŭkcio en la 66a UK en Brazilo estis sukcesa kaj refreŝiga por la kongresa programo. Kompreneble, nun oni planas aŭkcion por la 67a UK en Antverpeno ĉi-jare. Efektive la ĝisnunaj aŭkcioj iel ligiĝis al la Libroservo de UEA, kvankam la tuta gajno iris al diversaj fondaĵoj. Granda plimulto de la aŭkciaĵoj estis donacita. Ni ne vidas grandajn problemojn provi realigi la proponon de nia leganto el Finnlando. Ĉu efektive ekzistas intereso pri koresponda aŭkcio? Kiajn aŭkciaĵojn oni povas proponi? Bonvolu skribi pri tiuj demandoj – kiel eble plej detale kaj konkrete – al la adreso de la redakcio.

---

iisma rolo. Ekzemple, ni eble publike diskutu la fakton, ke, kiam s-ro L. Sussman** parolis kun grupo dum la rejkjavika UK, la neanglalingvaj ĉeestantoj videble tre volis montri, kiom multe ili scias la anglan kaj povas paroli ĝin. Sed la rekta eldiro, ke "finfine la angla rolas nur kiel **help**lingvo, analoge al la franca siatempe (eĉ malpli grave ol iam la franca mem)", estas analizo, pri kiu oni povas nur ĝentilete tusi. Oni proponas neniun argumenton kontraŭ la intelekte kohera verkaro de la generacio de Tyresö, kiu siatempe elmetis malan analizon. Mi trovas malfacila kompreni, kiel inteligentaj homoj povas nei la imperiisman rolon de la grandaj lingvoj (precipe de la angla), per simple la vorto "finfine", ŝajne rigardata kiel elokventa argumento.

Kial do mi konsentas, ke oni pragmatisme rilatu al la angla? Pro tute persona konjekto, kiun mi proponas por via senkompata kritika draŝado por ke io pli vera aperu. (Tolstoj diris en *Milito kaj paco*, ke estas tre malfacile por junaj homoj diri la veron.) Jen ĝi: ĉiu interlingvo, kiel Dario Besseghini prave diras (*Kontakto* 69, p.3-5), havas sian manieron esti interlingvo. La angla havas alian manieron ol la franca. La ĝusta karakterizo de tiu alieco ne estas, kiel la raŭmanoj diras, ke "la angla rolas ... eĉ malpli grave ol iam la franca mem". Ĝi eble estas, ke la angla tuŝas aliajn dimensiojn de interhomaj kontaktoj, aliajn emfazojn – komercan, popmuzikan, modern-burokratian kaj teknikan, grand-institucian aŭ supraĵe-personan. Eble la mondo havas **tian** interlingvon nun en parta funkciado ĉar ĝia nuna evoluŝtupo postulas tian integriĝon pli ol la personan integriĝon, kiun Esperanto ebligas, aŭ ol la diplomatian kaj intelekte-kulture universal-ŝajne elitan, kiun la franca ebligis (pardonu la krudajn karikaturojn). Eble la mondo malrapide evoluos, pere de aliaj tonoj kaj aliaj parte funkciantaj interlingvoj, al tia ŝtupo kie Esperanto necesos, kaj eble ĝis tiam Esperanto povos evolui, per vastigo de siaj socia bazo, talentogamo, enhavo k.s. al vera kapablo por kontentigi la tiaman bezonon. Pro ĉi tiaj personaj pensoj, verŝajne eraregaj, mi konsentas, ke oni pragmatisme rilatu al la angla kaj al ĝia aktuala potenco.

Sed mi ne konsentas nei, ke tiu potenco estas maljusta kaj faras evidentan damaĝon al tuta gamo da valoraj aferoj. La fakto, ke ni devos travivi ankoraŭ unu-du epokojn da lingva imperiismo, ne voligas min nei, ke imperiismo estas imperiismo, kaj ke necesas kunlabori kun ĝiaj viktimoj kaj malamikoj. Se iu efektive volas nei tiajn aferojn, tiu bonvolu elmeti siajn argumentojn minimume je tiu nivelo de kohero, kiun atingis la generacio de Tyresö, homoj, kiuj multfoje kaj plurnivele montris kaj montras la ekziston kaj danĝerecon de la lingva/kultura imperiismo.

Mi havas fakte la impreson, ke la manifestantoj de Raŭmo volas diri, ne ke la angla aŭ alia lingva imperiismo estas akceptebla, sed simple "Ho, lasu nin esti normalaj homoj kaj gaji, dum ni povas!" Sed tiu sento (kiun, kiel miaj geamikoj el inter la raŭmaj subskribintoj scias, mi persone konsentas) ekzistas en kriza kontraŭdiro kun la akcepto de la ideologio, por kiu zorge pledadis la homoj de Tyresö. Eble tio estas la vera identecokrizo. Se jes, verŝajne ĝi ne estas solvebla, almenaŭ ne per dokumentoj. Ĉu ekzistas valora socisanĝa movado, kies anoj ne volas persone plenhome vivi (spitante, kaj povante gaje forgesi foje, la ombron de la malvelkema potenco) sen perfido de siaj principoj? Sed tio estas temo de romanoj (legu Marilyn French), ne de manifestoj.

Probal Daŝgupto

** L. Sussman estas usona specialisto pri komunikado kiu estis gasto de la 62a Universala Kongreso en 1977.

Starta testo

EN UNUAGRADA KURSO de Esperanto, ekster la lernejoj, kutime partoprenas homoj kun diversa klereco kaj malsamaj lingvaj konoj pri la ĝenerala kaj la koncerna nacia gramatiko. Se la kursgvidanto scias la nivelon de tiuj konoj, li aŭ ŝi pli sukcese gvidos la kurson. La kursgvidanto povas ekscii tiujn konojn per skriba testo, kiun mi nomas "starta". Ĝin la kursgvidanto povas doni en la enkonduka horo de la kurso kiel skriban hejman taskon. Al la demandoj la kursanoj, kompreneble, respondos en sia nacia lingvo. Por respondi, ili havos eblon konsulti kaj serĉi helpon de kiu ajn kaj de kie ajn. La serĉado de tia helpo estos nepre utila por ili.

Per la starta testo la kursgvidanto atingos ankaŭ aliajn celojn. Klariĝos la rilato de la kursanoj al la kurso mem: interesitaj kursanoj partoprenos la teston volonte kaj kun la necesa seriozeco, dum la neseriozaj kursanoj neglektos ĝin. Krome, la starta testo ebligos al la kursanoj kompreni la diferencon inter la praktika kaj teoria konoj de la gepatra lingvo. Tiuj konoj ne estas unu kaj la sama afero.

Fine, la starta testo servos kiel elirpunkto por pritakso de la atingitaj rezultoj de la kurso koncerne la teoriajn konojn pri la gepatra lingvo de la kursanoj. La kursgvidanto komparos la konojn de la kursanoj, montritajn en la starta testo kun tiuj montritaj en la fina ekzameno.

La demandoj, al kiuj la kursanoj provos respondi, tuŝu diversajn flankojn de la koncerna nacia lingvo: leksikon, vortfaradon, morfologion, sintakson, stilistikon. Por doni la celatan rezulton tiuj demandoj devas esti ne tre elementaj, sed ankaŭ ne tro malfacilaj por la kursanoj.

Estas konate, ke la sama demando povas esti facile respondebla en unu, kaj malfacile en alia nacia lingvo. Ekzemple, al la demando "Kiamaniere oni formas la pluralon en via nacia lingvo?" – la turkoj facile respondas, sed malfacile povas respondi la bulgaroj. En la turka lingvo, simile al Esperanto, la pluralon oni formas morfologie per unu finaĵo en du variantoj: **lar** aŭ **ler**. Tiun finaĵon la turkoj gluas al la substantivo. **Lar** aŭ **ler** oni uzas depende de la lasta vokalo de la substantivo en singularo; se tiu vokalo estas malmola (a, o, u, ı), oni uzas **lar**: ad**a**m – ad**a**m**lar** = homo – homoj; se tiu vokalo estas mola (e, i, ö, ü), oni uzas **ler**: g**ü**l – g**ü**l**ler** = rozo – rozoj.

Tial la demando pri la formado de pluralo en starta testo por la turkoj ne estas konvena (pro ĝia facileco), sed ĝi estas tre trafa por la bulgaraj kursanoj. La formado de pluralo en la bulgara lingvo estas komplika, ĉar la bulgaroj por tiu celo uzas multajn finaĵojn. Kiu finaĵo konvenas por donita substantivo, dependas de la gramatika genro de la substantivo kaj ĝia fonetika konsisto en singularo.

Jen eblaj demandoj en starta testo por la bulgaroj:
1) Kiom da parolelementoj estas en la bulgara? Skribu iliajn nomojn.

Eksterlernejaj Esperanto-kursoj ĉiam konsistas el personoj, kies sola komuna trajto estas ilia intereso pri la Internacia Lingvo. Por sukcese kontentigi tiun intereson necesas bone konatiĝi kun pluraj aliaj kvalitoj de la gekursanoj.

2) Ĉu ekzistas kazoj en la bulgara lingvo? Kiamaniere oni esprimas la kazajn rilatojn?
3) Kion vi scias pri la konsisto de la apartaj vortoj? Kiujn partojn en la vorto oni distingas?
4) Kiel nomiĝas la adverbo kiel parto de la propozicio?
5) Kio estas sinonimoj? Donu kelkajn ekzemplojn de sinonimaj vortoj.

Respondon al la demandoj la kursgvidanto donos en unu el la sekvaj instruhoroj. Tiam la kursanoj povas kompari siajn respondojn kun tiuj de la kursgvidanto kaj tiamaniere ili konstatos en kia grado ili ĝuste kaj bone respondis.

Interesita leganto de tiu ĉi artikolo povas provi respondi al la supraj demandoj en sia nacia lingvo kaj ankaŭ en Esperanto. Poste oni povas kompari siajn respondojn kun tiuj donitaj sur la paĝo 53.

Metodi Pančev

Kiel elekti: Kion fari? Kien iri?

Tutjare

Kursoj, turismaj kaj kulturaj aranĝoj, Varna kaj Smoljan, Bulgario (Internacia E-Kursejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)

Marto

12-14 Foira E-ista Renkontiĝo, Leipzig, Germana DR (Kulturbund, IFER, Käthe-Kollwitz-Str. 115, DDR-701 Leipzig)

19-21 Dana E-Kongreso, Odense, Danlando (Esperanto-Centro, Banegårdsgade 19, DK-8000 Aarhus C)

19-23 4a Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Pardubice, Ĉeĥoslovakio (ĈEA, Jilská 10, CS-110 00 Praha, Ĉeĥoslovakio)

19-28 Festivalo de Esperantaj Teatroj, Budapest, Hungario (HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)

26-28 Renkontiĝo de kolektantoj de esperantaĵoj, Valtice, Ĉeĥoslovakio (s-ro V. Hasala, CS-691 42 Valtice, Ĉeĥoslovakio)

26-28 Pajleja Semajnfino, Scharzfeld, FR Germanio (s-ro J. Kreter, Heidelgasse 2, D-3420 Herzberg 4)

26-28 SATEB-Kongreso, Swanwick, Anglio (SATEB, 29 Farrance Road, Chadwell Heath, Essex, Britio RM6 6EB)

26-28 Studenta E-Renkontiĝo, Ohrid, Jugoslavio (Esperanto-Societo, Daje Djumbazov 42a, YU-91000 Skopje, Jugoslavio)

27-28 Kultura Semajnfino, Mesnil-Saint-Père, Francio (s-ino S. Bourot, 15b rue Morel-Payen, F-10000 Troyes, Francio)

27-28 Semajnfina kurso, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, Poŝtfako 771, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando)

31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas.

31 Limdato de la Belartaj Konkursoj de UEA

Aprilo

02-04 Skota Esperanto-Kongreso, Cupar, Skotlando (f-ino P. Sinclair, "Kenmore", Erskine St., Buckhaven, Britio KY7 1JT)

02-04 Kalifornia Esperanto-Konferenco, San Diego, Usono (d-ro D. Jordan, Dept. of Anthropology, University of Calif., La Jolla, CA 92093)

03-04 41a Kongreso de Orientfranca E-Federacio, Mulhouse, Francio (s-ro A. Grossmann, 5 rue des Pyrénées, F-68390 Baldersheim)

04-11 Infanrenkontiĝo kaj lingvaj diskutrondoj, Baugé, Francio (Kulturdomo Grésillon, F-14950 Baugé)

06-11 Junulara E-Renkonto, Nyiregyháza, Hungario (Junulara Komisiono, Pf. 193, H-1368 Budapest)

08-12 6a Internacia Junulara Festivalo de IEJ, Trieste, Italio (IEJ, C.P. 210, I-56100 Pisa)

09-12 66a Brita Kongreso de Esperanto, Southampton, Anglio (s-ino M. Austin, 15 Haselbury Road, Totton, Hants., Britio SO4 3DR)

09-12 Paska Renkontiĝo de NEJ, Hoeven, Nederlando (NEJ, Mariken Creuwels, Dromedarisstraat 27, NL-6531 NS Nijmegen)

10-12 37a Kongreso de SAT-Amikaro, St. Pierre de Chandieu, Francio (Andrée Nove, RN 7 La Lignère, F-69360 St. Symphorien d'Ozon)

10-12 Kongreso de Franca Katolika E-Asocio, Nancy, Francio (s-ino Paradis, 16 rue Pierre Curie, F-F-54110 Dombasle, Francio)

13-16 Renkontiĝo de Kvakera E-Societo, Fareham, Anglio (M. Davies, 69 Twemlow Parade, Morecombe, Lancs., Britio LA3 2AL)

14 D-ro L.L. Zamenhof mortis en 1917 (antaŭ 65 jaroj)

16-18 61a Kongreso de FLE, Bennekom, Nederlando (OKK, Pieter Bothstr. 21, NL-2315 AP Leiden)

23-25 Marŝado "Kilometroj de Amikeco", Jablonec, Ĉeĥoslovakio (ĈEA, Jilská 10, CS-110 00 Praha)

24 Trilanda Renkontiĝo, Heerlen, Nederlando (s-ro H. Peters, Nobelstr. 57, NL-6411 EL Heerlen)

24-25 2a "Siringa Vespero" – konkurso-recitalo de E-poezio, Loveĉ, Bulgario (OR na BES, Pk. 29, BG-5500 Loveĉ)

25-30 10a Studenta Interlingvistika Seminario, Pomiechowek, Pollando (Rada Uczelniana SZSP UW, Interlingwistyczne Kolo Naukowe, Krakowskie Przedmieście 24, PL-00 325 Warszawa)

25-30 Seminario por gvidantoj de la junulara E-movado, Pomiechowek, Pollando (TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Ned.)

Venas la tempo de renkontiĝoj, kunvenoj, seminarioj, studsemajnoj, kongresoj, jarkunvenoj, prelegserioj, feriaj vojaĝoj kaj – ĉefe – revido de geamikoj kaj konatoj, kun kiuj oni tra la jaro interŝanĝas nur eventualajn leterojn kaj telefonvokojn pri komunaj movadaj taskoj kaj iniciatoj.

Majo

01-03 8a Renkontiĝo de E-junularo, Mostar, Jugoslavio (Esperanto, V. Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio)
02-08 34a Kongreso de IFEF, Balatonfüred, Hungario (IFEF, Fervojista Sekcio de HEA, Pf. 7, H-1378 Budapest, Hungario)
07-09 Renkontiĝo de junaj e-istoj, Pribylina, Ĉeĥoslovakio (AESSR, Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad, Ĉeĥoslovakio)
08-09 Langvedoka-Katalunia Renkontiĝo, Perpignan, Francio (E-ista Centro, 72 ave. du Général de Gaulle, F-66000 Perpignan)
14-16 70a jubileo de E-grupo, Bologna, Italio (Bologna E-Grupo "A. Tellini", Via Cartoleria 17/2°, I-40124 Bologna, Italio)
15-16 Maja Renkontiĝo, Trojan, Bulgario (L. Lajev, Pârvomajska 29, BG-5600 Trojan)
21-23 Pacamika Renkontiĝo, Pardubice, Ĉeĥoslovakio (s-ino H. Milada, Wolkerova 2071, CS-530 02 Pardubice, Ĉeĥoslovakio)
21-23 Printempa E-ista Renkontiĝo, Stará Lubovňa, Ĉeĥoslovakio (AESSR, Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad, Ĉeĥoslovakio)
28-30 10a Renkontiĝo de portugalaj e-istoj, Caldas da Rainha, Portugalio (PEA, Rua Doutor João Couto 6 r/c - A, P-1500 Lisboa)
28-31 60a Germana E-Kongreso, Münster, FR Germanio (Brandenburg, Brinker Damm 24, D-4404 Telgte, FR Germanio)
28-31 3a Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj, Torun, Pollando (Dyr. Roman Tubaja, Muzeum Etnograficzne, Waly Gen. Sikorskiego 19, PL-87 100 Torun, Pollando)
28/06 01 Kongreso de UFE, Orléans, Francio (UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)
29/06 05 Viena Festivala Semajno, Wien, Aŭstrio (Turisma E-Centro, Frostgasse 27/2, A-1100 Wien)

Junio

15-24 16a Internacia Konferenco de ILEI, Seiano di Vico Equenso, Italio (LKK, Rolando Incoronato Pia, V. Panoramica 63, I-80056 Ercolano, NA)
17-24 Kongreso de KELI, Burgh-Haamstede, Nederlando (Els van Dijk-Kuperus, Koningsmantel 4, NL-2403 Alphen a.d. Rijn)
18-20 Kultura Semajnfino, Homburg-Saar, FR Germanio (SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt)
28/07 03 Turisma Vojaĝo tra suda Norvegio (Turisma Servo de NEL, Olaf Schous vei 18, Oslo 5)
28/07 16 Esperanta Somera Sesio, San Francisco State University, Usono (Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010)
30/07 13 15a Pionira Internacia Tendaro, Zánka, Hungario (Teritoria Komitato de HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs, Hungario)

Julio

01-10 Internacia Gejunula Renkontiĝo, Borik-Zadar, Jugoslavio (IKS, Amruševa 5, YU-41000 Zagreb)
01-10 2a Internacia Feriado "Borima - 82", Borima, Bulgario (OR na BES, Pk. 29, BG-5500 Loveĉ)
03-12 Somera E-Lernejo, Visoko, Jugoslavio (Esperanto, V. Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo)
04-10 20a Somera E-Universitato, Gyula, Hungario (Konsilantaro de SEU, 48-as u. 11, H-5700 Gyula)
04-17 Mediprotekta Laborbrigado, Szentendre, Hungario (Junulara Komisiono de HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario)
04-17 Junulara E-Lernejo, Bardejov, Ĉeĥoslovakio (Stano Marček, Zvolenská 15, CS-036 01 Martin)
04/08 14 Someraj E-Tendaroj, Třebíč-Lančov, Ĉeĥoslovakio (AESSR, Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad, Ĉeĥoslovakio)
07-11 Simpozio pri Sporto en la Moderna Socio, Madrid, Hispanio (Madrida E-Liceo, c/Atocha 98-4°, Madrid 12, Hispanio)
09-15 Franc-germana junulara seminario, Aix-en-Provence, Francio (GEJ, Malthildenstr. 73, D-2800 Bremen, FR Germanio)
10-24 E-Renkontiĝo de ICEM, Budapest, Hungario (H. Menard, 1 rue de la Galissonière, F-44330

Vallet, Francio/G. Ösz, Hengermalom u. 47, H-1116 Budapest XI)
11-24 Somera E-Lernejo, Jasov, Ĉeĥoslovakio (CK AESSR, Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad)
16-20 Kongreso de ELNA, St. Petersburg, Usono (ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530)
16-21 42a Hispana E-Kongreso, Málaga, Hispanio (HEF, Dos de Mayo 4, Valladolid, Hispanio)
17-19 Tutamerika Kongreso de E-o, Bogotá, Kolombio (Esperanto, A.A. 54800, Bogotá)
17-23 39a Kongreso de IKUE, Lille, Francio (39a IKUE-Kongreso, Centre des Dominicains, 7 ave. Salomon, F-59800 Lille)
19-28 15a Internacia Renkonto Naturamika, Abaliget, Hungario (Teritoria Komitato de HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs, Hungario)
23 5a Konferenco pri la Lingva Problemo en Scienco, Antwerpen, Belgio (Dr. W. De Smet, Hertendreef 12, B-2180 Kalmthout)
23-26 15a Brazila Seminario de E-o, Uberlândia, Brazilo (KKE, Av. Treze de Maio 47, Sobreloja 208, BR-20031 Rio de Janeiro, RJ)
24-30 Turisma Semajno, Slovakio, Ĉeĥoslovakio (AESSR, Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad)
24-31 67a Universala Kongreso de Esperanto, Antwerpen, Belgio
25/08 07 Laborbrigado 82, Ahlersbach bei Schlüchtern, FR Germanio (Eki Woite, An der Kirche 33, D-6115 Münster, FR Germanio)
27/08 28 Kulturaj aranĝoj de Grésillon, Baugé, Francio (E-ista Kulturdomo Grésillon, F-41950 Baugé, Francio)
31/08 06 55a Kongreso de SAT, Iisalmi, Finnlando (OKK, Loukenk. 5, SF-74100 Iisalmi-10)
31/08 07 50a Internacia Kongreso de LIBE, Breda, Nederlando (s-ino N. Reinders, Zwaansmeerstr. 48, NL-1946 AE Beverwijk)
31/08 07 38a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, Leuven, Belgio (38a IJK, Duisburgsestraat 12, B-3030 Leuven-Heverlee)

Aŭgusto

01-15 Komputista Marborda Ripoztendaro, Bulgario (Komputista Grupo de HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario)
02-14 Somera E-Lernejo, Eger, Hungario (Departementa Komitato de HEA en Heves, Pf. 105, H-3301 Eger)
08-31 2a Laborbrigado Arkeologia (IELBA), Debnevo, Bulgario (OR na BES, Pk. 29, BG-5500 Loveĉ)
13-15 Seminario pri E-o en scienco kaj tekniko, Ĉeske Budéjovice, Ĉeĥoslovakio (ĈEA, Jilská 10, CS-110 01 Praha 1, Ĉeĥoslovakio)
14/09 04 Trisemajna e-ista vizito al Ĉinio (N. Durham, 80 Morley Road, Chadwell Heath, Romford, Essex, Britio RM6 6XA)
16-20 Turismaj Tagoj, Žilina, Ĉeĥoslovakio (E-klubo, Dom odborov, CS-010 01 Žilina)
21-28 Familia Tendaro, Thomsdorf, Germana DR (Werner Pfennig, Leibnitzstr. 5/67, DDR-2000 Neubrandenburg, Germana DR)

Septembro

01-30 Slovakia E-ista Libertempejo, Dudince, Ĉeĥoslovakio; kunvenoj de naturamikoj, vegetaranoj, ktp. (E. Váňa, okres Zvolen, CS-962 71 Dudince)
02-09 3a Internacia E-Seminario "Ora Aŭtuno - 82", Borima, Bulgario (OR na BES, Pk. 29, BG-5500 Loveĉ, Bulgario)
03-05 Interfederacia Konferenco, Caerlon, Kimrio (P. C. Willey, 4b Highfield Drive, Portishead, Avon, Britio BS20 8JG)
04-11 Ferio-Semajno de TANEF, Cavigliano, Svislando (Erna Döring, Pf. 225, CH-4003 Basel)
12-19 E-ista Semajno, Sète, Francio (Esperanto, 5 rue Docteur Roux, F-34000 Montpellier)
24-26 Kultura Semajnfino, Blieskastel-Niederwürzbach, FR Germanio (SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt, FR Germanio)

Oktobro

01-03 Regiona E-Konferenco, Port Townsend, Usono (Esperanto/L.B. Ros, 4743 Fifth NE, Seattle, WA 98105, Usono)
06-10 Infana Renkontiĝo, Zagreb-Velika Gorica, Jugoslavio (IKS, Amruševa 5, YU-41000 Zagreb)
06-10 Turista Renkontiĝo, Schwarzenberg, Germana DR (Rudolf Eichler, Walter-Ulbrichtstr. 2, DDR-9430 Schwarzenberg, Germana DR)

07-10 Pupteatra Internacia Festivalo, Zagreb-Velika Gorica, Jugoslavio (IKS, Amruševa 5, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio)
21/11 12 Usona E-Vojaĝo al Ĉinio (Lucy Harmon, Howard Travel Service, 578 Grand Ave., Oakland, CA 94610, Usono)
22-24 Norvega-Sveda Renkontiĝo, Budor/Løten, Norvegio (NEL, Olaf Scous vei 18, Oslo 5, Norvegio)
24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj

Novembro

04-08 Scienca Aŭtuna Forumo, Miskolc, Hungario (Scienca kaj Faka Komisiono de la Junulara Komisiono de HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest)
26-28 Kulturaj E-Tagoj, Poprad, Ĉeĥoslovakio (AESSR, Sobotské nám. 6, CS-058 01 Poprad)

Decembro

10 Tago de Homaj Rajtoj
28/01 02 12a Vintra E-ista Ferio, Budapest, Hungario (Budapeŝta Komitato de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest, Hungario)
28/01 02 Internacia Komputista Simpozio, Budapest, Hungario (Komputista Grupo de HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario)
29/01 02 Renkonte al la Novjaro, Smoljan, Bulgario, (Internacia E-Kursejo, Pk. 791, BG-1090 Sofia)

Jen tutmonda antologio je nia dispono

Tutmonda Sonoro, de K. Kalocsay (1891-1976). Redaktis V. Benczik (1945-). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1981. 8+664p. 20 cm. Du volumoj. Tole bindita. Serio Oriento-Okcidento n-ro 17. ISBN 963 571 077 1. Prezo: 66,00 gld.

En 1913 Antoni Grabowski publikigis en Varsovio *El parnaso de popoloj,* en kiu li prezentis aŭdacajn, plurloke brilajn tradukojn de 110 pecoj el 30 lingvoj, inter kiuj la pola estis nature la plej favorata. La tuj poste eksplodinta milito probable malhelpis, ke tiu poemaro ricevu la merititan atenton kaj sukceson. Ĝi havis tamen unu bonan sekvon: ĝi vekis la konkuremon de alia poeto, kiu devis ludi en la "Renesanca" periodo de nia lingvo rolon paralelan al tiu de Grabowski en nia "Mezepoka".

En 1931 K. Kalocsay publikigis en Budapeŝto la juvellibron *Eterna bukedo,* tradukojn de 270 pecoj el 20 lingvoj. Sed tiu unua rezulto ne kontentigis lian vastan ambicion; post la dua mondmilito li projektis pligrandigitan eldonon, kies titolon li jam difinis, la *Tutmonda Sonoro.* Oni scias, ke li mortis antaŭ ol povi realigi sian revon. Nun, liaj amikoj kaj samurbanoj sukcesis eldoni la jam efektivigitan parton de tiu grandioza entrepreno, kaj ni povas ĝoji, ke, dank' al s-ro Benczik kaj liaj kunlaborintoj, ĉiuj iom sentemaj esperantistoj povas nun taksi la tutan grandecon de Kalocsay kiel tradukisto kaj, se diligentaj, ĝuadi la belecon de la Esperanta formo, per kiu li revestis la fremdlingvajn originalaĵojn. Ĉar, por tion atingi, la hodiaŭaj legantoj, kutimiĝintaj al la modernaj "liberaj versoj" (kiuj ne estas metrikaj unuoj, sed pli-malpli lertaj detranĉoj el pli-malpli harmonia prozo), bezonos lerni, ke klasika poemo obeas al reguloj tiel striktaj kaj kompleksaj, kiel tiuj de fugo aŭ de sonato. Tial konsilinde estas legi komence la artikolon, kiun laŭ mia instigo Kalocsay verkis en 1959 por la *Nica literatura revuo,* pri "La klasika metriko en Esperanto", kaj kiun s-ro Benczik havis la bonan ideon reprodukti (p. 568-595). Li krome zorgis aldoni liston de klarigitaj propraj nomoj (oni korektu p. 603 "Harisoj" al "Ĥarisoj", kaj p. 633 "Silentarios" al "Silentiarios" – bela nomo, kiu signifis nur kortega pedelo!).

La plej granda parto de la unua volumo estas dediĉita al la greka kaj latina literaturoj, kaj prezentas pri ili preskaŭ kompletan panoramon; preskaŭ, ĉar mankas al la unua tradukoj el Homero – pro mia kulpo, mi konfesas: Kalocsay rezervis por mi elektitajn pecojn el la "Odiseado", sed, tro okupite de miaj vortaraj taskoj, mi ne povis plenumi lian planon. Krom tiuj klasikaj literaturoj, oni legos kun intereso transponojn el la prasemidaj (la eposo de Gilgameŝ, la Inferiro de Iŝtar), el la praegipta, el la lirikaj partoj de la hebrea Biblio (sed kial la eldonisto represis dufoje la samajn pecojn de la "Alta Kanto", p. 46-47?), el la ĉina, la japana kaj la araba.

La elekto el la modernaj literaturoj de Eŭropo estas ankoraŭ pli varia kaj abunda, kvankam ĝi ne prezentas la tutaĵon de la tradukitaĵaro de Kalocsay: el la antaŭe aperintaj kolektoj (la *Hungara antologio, La floroj de l' malbono,* la *Kantoj kaj romancoj de Heine, Libero kaj amo* de Petöfi) la eldonisto elektis la plej konatajn pecojn; kompense li diligente traserĉis la diversajn gazetojn kaj revuojn, el kiuj li kolektis disajn tradukaĵojn (Unu tamen li preteratentis: la Byronan soneton "On Chillon", aperintan en *Literatura mondo* de 1949, p. 121). En tiu moderna parto Kalocsay ne intencis enmeti pecojn el teatraĵoj, kaj la eldonisto respektis tiun intencon: iuj des pli demandos sin, kial tamen enestas la unua akto de "La Cido" de P. Corneille: la kaŭzo estas, ke siatempe mi tradukis tiun tutan tragedion, per sepjambaj versoj sen vira cezuro; Kalocsay ĝuste opiniis tiun ritmon ne adekvata, konsilis al mi refandi la tuton en la aleksandran formon, kaj por instigi min, refaris mem tia la unuan akton – vane, ĉar mi neniam kuraĝis daŭrigi! (P. 345, linio -3, korektu "Helena" al "Ĥimena").

Jen do, je nia dispono kaj por nia plezuro, tutmonda antologio de 581 poemoj el ĉ. 30 lingvoj. KomprenebleKalocsay ne scipovis tiom da lingvoj, kaj li helpis sin per tradukoj faritaj el la hungara, germana, franca aŭ angla. Sed la ĉefa kvalito de poezia traduko kuŝas

STARTA TESTO (Vidu la paĝon 49)

1) La parolelementoj estas jenaj: artikolo, substantivo, pronomo, adjektivo, numeralo, verbo, adverbo, prepozicio, konjunkcio, interjekcio.

2) En la nuna bulgara lingvo ne ekzistas kazoj. La kazajn rilatojn oni esprimas per prepozicioj. En Esperanto ekzistas nur unu kazo – akuzativo. La ceterajn kazojn oni esprimas per prepozicioj.

3) La vortoj en ambaŭ lingvoj – la bulgara kaj Esperanto – povas esti simplaj (primitivaj) kaj kunmetitaj. En kunmetitaj vortoj oni distingas: radikon, prefikson, sufikson, finaĵon.

4) La adverbo kiel frazelemento en ambaŭ lingvoj nomiĝas: cirkonstanca komplemento (adjekto).

5) Sinonimoj estas vortoj kun sama aŭ proksima signifo: edeno – paradizo; kontraŭulo – malamiko; ŝanceliĝi – heziti; neutila – senutila – malutila ktp.

M.P.

ne tiom en la strikta laŭvorteco, kiom en la rekreado de la originala harmonio kaj etoso. Dank' al vasta kulturo, genia intuicio kaj perfekta posedo de la lingvo kaj metriko, Kalocsay sciis kapti, se mi povas diri, la esencan parfumon de ĉiu poemo kaj konservi por ni, en aliforma flakono, ties naskiĝan aromon.

G. Waringhien

Instiga ekzemplo

Proverbaro franca-Esperanta, kun aldono: Esprimoj sankciitaj de l'uzado, de Lucien Bourgois. Noyelles-Godault: Nordfranca E-Federacio, 1981. 47p. Ilus. 30cm. Mimeo. Prezo: 5,40 gld.

La proverboj formas valoran parton de la heredaĵo de ĉiu lingvo. Ili enhavas saĝon de la ĉiutaga vivo, ĉerpitan el la praktiko tra jarcentoj. Jam d-ro L.L.Zamenhof komprenis tiun signifon, ankaŭ por la internacia lingvo Esperanto, ĉar li mem tradukis multajn proverbojn el diversaj lingvoj.

Lucien Bourgois kolektis kaj tradukis en Esperanton multajn francajn kaj aliajn proverbojn, por helpi la esperantistojn esprimi sin pli facile. La kolekto konsistas el du partoj ("Proverbaro" kaj "Esprimoj sankciitaj de l'uzado") kaj estas ilustrita per ŝercaj desegnaĵoj. Plej multaj proverboj de ĉi tiu simpla (tajpita) eldonaĵo estas tradukitaj de d-ro Zamenhof.

La ekzemplo de Bourgois eble povas instigi alilandanojn kolekti kaj traduki proverbojn kaj esprimojn el siaj gepatraj lingvoj.

W.A.M. van Heugten (Nederlando)

Plurrilate modela lernilo

Taschenlehrbuch Esperanto, de Till Dahlenburg kaj Peter Liebig. Leipzig: VEB Verlag Enzyklopädie, 1981 (2a eldono, reviziita). 266p. Ilus. 18cm. Bindita. Prezo: 15,00 gld.

Begleitmaterial für Kursleiter, de Till Dahlenburg. Berlin: Zentraler Arbeitskreis Esperanto, 1978. 74p. 21cm. Prezo: 6,00 gld.

Begleitmaterial zum Selbstunterricht, de Till Dahlenburg. Berlin: Zentraler Arbeitskreis Esperanto, 1979. 74p. 21cm. Prezo: 6,00 gld.

Leginte la lernolibron kun akompanaj gvidilo por kursgvidantoj kaj kajero por studantoj, mi iom ĵaluzis pri ĉi tiuj eldonaĵoj. Ĉar temas pri vere profesia studkaj instru-materialo, kiun oni ne tiel ofte trovas en Esperanto.

Unue pri la lernolibro. Aspekto profesia; moderna, klara prezento; facile uzebla. Ja sufiĉe ofte oni "forgesas" pri la aspekto eldonante Esperanto-librojn. Nu, ĉi tiu lernolibro povas konkurenci kun similaj pri aliaj lingvoj, kiuj verŝajne estas pli vaste uzataj de gestudantoj.

Pri la enhavo: Oni tuj rimarkas la intencon de la verkintoj prezenti lingvo-elementojn por praktika uzado. Tio nur povas esti pozitiva diferenco kompare al aliaj Esperanto-lernolibroj. La ekzercoj estas sufiĉe variaj, la ŝercoj (samkiel kaj ofte samaj kiel en la hungara E-lernolibro *Esperanto en 30 tagoj*) certe helpas stimuli la lernemon. La gramatikon oni pritraktas koncize en la lecionoj; malantaŭe en la libro troviĝas resumo (fakte ne pli detala pritrakto, kiel eble taŭgus en kelkaj kazoj).

Kompreneble mi ankaŭ havas kelkajn rimarkojn:
– Pri la celgrupoj: mi havas la impreson, ke la libro estas precipe verkita por tiuj, kiuj almenaŭ finis mez-

gradan lernejon. Inter la figuroj en la libro svarmas intelektuloj. Kaj ŝajne la virinoj en la libro ankoraŭ estas bonaj dommastrinoj, kvankam aŭdiĝas jam feminismaj grumbletoj. Oni ankoraŭ prezentas la tradiciajn rolojn.
– Kelkaj artifikoj iom ĝenas: La patro deliras: "Vivu nia nova, moderna kolortelevido! " Kaj mi vere renkontis multajn strangulojn inter esperantistoj, sed ankoraŭ neniun, kiu matene dum libertempo lirike deklamas partojn el "La vojo".
– Prilingvaj rimarkoj: "Patrino estas hejme" (p.39), mankas la artikolo; interesiĝi (p.69) ne devenas de "intereso", sed "interesi". Mi subtenas la uzadon de "pulovro".

La akompanaj kajeroj por gelernantoj kaj geinstruistoj kompletigas la lernolibron. La konsiloj por kursgvidantoj tre taŭgas, la plilarĝigo de la studmaterialo en la kajero por gelernantoj certe kontentigos bezonojn. Ankaŭ la informoj en tiuj kajeroj estas celtrafaj.
Ĉu mirige, ke mi, kompilante novan Esperanto-kurson por nederlandlingvanoj, multe profitis el tiuj eldonaĵoj?

B. de Wit (Nederlando)

LIBROSERVO DE UEA denove disponas pri jenaj titoloj: *La teatra korbo* de Baghy (5,40 gld), *Plena E-juda / juda-Esperanta vortaro* de Fineman (23,40), *Winnie-la-Pu* de Milne (18,00), *La Nobla Korano* (66,00), *Geologio internacia* - 3 vol. (23,40)

Laste aperis . . .

Almanako Lorenz 1982. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1982. 194p. Ilus. 20cm. Kolekto de sepdeko da nelongaj tekstoj, kiuj traktas diversajn temojn el vidpunkto spiritisma. Prezo: 9,90 gld.

Aventuroj de Tom Sawyer, La (1876), Mark Twain (1835-1910). Laŭ hungarlingva koncizigo trad. Vilmos Benczik (1945 -). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1981. 28p. Ilustris A. Dargay. ISBN 963 571 085 2. 28cm. Bildstria rakonto. Prezo: 6,00 gld.

Edison: **Vivo de Edison**, Agostinho da Silva. El la portugala tr. José de Freitas Martins. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1981. 16p. Multobligita. 21cm. Pri la usona inventisto (1847-1934), kiu enkondukis i.a. la elektran lumampolon en la ĉiutagan vivon. Prezo: 1,20 gld.

Gastejestrino, La (1752), Carlo Goldoni (1707-1793). El la itala trad. Carlo Minnaja (1941 -). Pisa: Edistudio, 1981. 154p. 21cm ISBN 88 7036 014 8. Unu el la plej popularaj komedioj de la fama itala teatristo. Kun enkonduka eseo kaj multaj notoj. Prezo: 18,00 guldenoj.

Geknaboj de Kastelo Grezijono, La, Audrey C.E. Childs-Mee (1926 -). Rotterdam: Mondkomerca Eldonejo Esperantista, 1981. Ilus. 27cm.Mimeo. Facila, porinfana kurslibreto. Prezo: 9,00 guldenoj.

Ha! se mi scius. . .; Atestaĵoj de diversaj spiritoj, vol. 1, Rose dos Anjos. El la portugala tr. João Carlos de Melo Mota. Brasília, 1981. 95p. 21cm. Pri la vivo transtomba. Prezo: 3,90 gld.

Language problem in the non-aligned movement, The – Some recommendations, Tibor Sekelj (1912-). Rotterdam: UEA, 1981. 12p. 21cm. ED-26A. Prezo: 3,00 gld.

Lingvogvidilo (toro-lalana) Esperanto-malagasa, Roger Randrianekena k.a. Sen eldonindikoj (1981). 6p. 21cm. Turisma frazaro, ankaŭ kun kelkaj vortoj pri Esperanto en la malagasa. Prezo: 1,50 gld.

1300 jaroj de la bulgara ŝtato 681-1981. Ŝumen: Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista Asocio, 1981. 96p. 21cm. Prelegoj ĉefe arkeologiaj pri la plej frua historio de Bulgario kiel ŝtato. Prezo: 6,00 gld.

Moderna kroatia prozo. Red. Ivan Krtalić (1941-). El la kroata tr. Roger Imbert (1938-). Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1979. 606p. Bindita. 21cm. Antologia kolekto de 34 noveloj de same multaj verkistoj, de la komenco de la 20a jarcento ĝis la nuntempo. Prezo: 58,50 gld.



Nigra kokino, La / Miki, Roman Dobrzyński. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, s.j. (1981? represo). 16p. Ilus. de Katarzyna Potkańska. 17cm. Mia libreto 1. Prezo: 1,80 gld.

Plansprache und Nationalsprache, Detlev Blanke (1941 -). Berlin: Akademie der Wissenschaften der DDR/Zentralinstitut für Sprachwissenschaft, 1981. 161p. 20cm. Linguistische Studien, Reihe A, Arbeitsberichte 85. Koncizigita versio de la samtema doktoriĝa disertacio. Prezo: 10,20 gld.

Printempo en la aŭtuno; Rakonto pri dolĉe melankolia renkonto (1931), Julio Baghy (1891-1967). Beijing: El Popola Ĉinio, 1981. 169p. 18cm. 10-Es-1557P. Patosplena amrakonto. Paralela teksto Esperanta-ĉina; la ĉinan tradukon faris la renoma verkisto Ba Jin (Bakin), kies propra *Aŭtuno en la printempo* inspiriĝis de la verko de Baghy. Prezo: 6,30 gld.

Privilegia vojo al lingvoscienco: Esperanto (1960), Vilho Setälä (1892-). Helsinki: Fondumo Esperanto, 1981 (5a internacia eldono). 128p. Ilus. 18cm. Rektmetoda kurso, inter la plej popularaj lerniloj. Taŭgas por memlernado kaj kursoj, instruante novajn vortojn per simboloj, desegnaĵoj aŭ jam lernitaj vortoj. Prezo: 9,00 gld.

Problème linguistique au sein du mouvement des pays non alignés et la possibilité de le résoudre, Le, Tibor Sekelj (1912-). Rotterdam: UEA, 1981. 16p. 21cm. ED-10F. Prezo: 3,00 gld.

Prometeo ligita (ĉ. 480 a.K.), Eshilo (525-456 a.K). El la helena trad. Albert Goodheir (1912 -). Glasgow: Eldonejo Kardo, 1982. 54p. 21cm. ISBN 0 905149 16 5. Fama klasika tragedio. Prezo: 14,40 guldenoj.

Receptaro de fiŝaj manĝoj. Kompilis Irena Papírníková. České Budéjovice: EK La Progreso, 1980. 12p. Ilus. de B. Čermák. 30cm. Receptaro de elektitaj sudbohemiaj manĝoj 2. 18 receptoj. Prezo: 2,10 gld.

Religia toleremo kaj maltoleremo, Albert Goodheir (1911-). Morecambe: Kvakera Esperantista Societo, 1981. 7p. 18cm. Teksto de prelego farita ĉe la 65a UK (Stokholmo, 1980). Prezo: 1,80 gld.

Sonetoj, La / The Sonnets (1609), William Shakespeare (1564-1616). El la angla trad. William Auld (1924 -). Pisa: Edistudio, 1981. 326p. 21cm. Bindita. Dulingva (angla-Esperanta) eldono. Serio Oriento-Okcidento n-ro 16. ISBN 88 7036 013 X. Prezo: 40,20 guldenoj.

Tito: **La legenda militestro**. Div. aŭtoroj. Tradukis R. Trifunjagić kaj B. Popović. Sarajevo: Esperanto-Ligo en Bosnio kaj Hercegovino, 1981. 90p. Ilus. 20cm. Ĉefe pri la kontraŭnazia rezisto, kiun estris la fondinto de la moderna Jugoslavio. Prezo: 9,00 gld.

Tito por unueco kaj aŭtentaj principoj, Josip Broz Tito (1892-1980) k.a. Tradukis S. Čolić. Sarajevo: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1980. 43p. 20cm. Dokumentoj el la 6a Konferenco de Nealiancitaj Landoj. Prezo: 5,40 gld.

Unua kompleta listo de Volapük-gazetoj kaj Listo de la Volapük-literaturo, Johann Schmidt (1895-1977). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1981. 4+56+9p. 21cm. Bibliografiaj informoj en la germana. Pli ol cent eroj en la unua listo, preskaŭ mil en la dua. Prezo: 14,40 gld.

Versaĵoj kaj prozo, Hồ Chí Minh (1890-1969). El la vjetnama kaj la franca tr. Dao Anh Kha, Nguyen Minh Kinh kaj Dang Dinh Dam. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo "Ruĝa Rivero", 1980. 130p. 19cm. Verkoj, kun ĉefe politika celo, de la fondinto de Vjetnama Socialisma Respubliko. Prezo: 6,00 gld.

Vjetnama Socialisma Respubliko. El la vjetnama. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1980. 272p. + mapo + 50p. da ilustraĵoj. 19cm. Manlibro pri la historio kaj nuna stato, inkluzive kulturon, de Vjetnamio. Prezo: 9,90 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18 procentoj por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj – 20 procentoj, por la mendoj super 200 guldenoj – 10 procentoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

TEJO-paĝo

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, p/a Esperanto-Centro, 140 Holland Park Ave., London, Britio, W11 4UF.

JUNULARGASTEJOJ:

Trajne al festivalo

PRESKAŬ tiel vasta kiel la delegita reto de UEA estas la reto de la tranoktejoj de Internacia Junulargasteja Federacio (IJGF) kaj ĝiaj naciaj organizaĵoj. Pro la internacieco de tiu reto, pro tio ke multaj gejunuloj – inter ili esperantistoj – uzas la servon de la junulargastejoj por dum vojaĝoj tranokti malmultekoste, ĉi tiu medio estas tre fekunda por informado pri Esperanto.

Gravan iniciaton sur ĉi tiu laborkampo faris lastatempe Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ). Informiĝinte ke meze de aŭgusto ĉi-jare estos en Hago granda festivalo okaze de la 50-jara jubileo de IJGF, NEJ kun sukceso petis permeson aldoni al la oficiala dosiero de la partoprenantoj de la festivalo informilojn pri Esperanto.

Sed tio ne sufiĉas! Lige kun la festivalo en Hago, tra Eŭropo veturos speciala festivala trajno. Ĝi ekiros de Vieno kaj venos al Hago tra Salzburg, Munkeno, Kolonjo kaj Utrecht. Survoje la partoprenontoj de la festivalo povos aliĝi al la karavano.

Jen estas bona okazo por la esperantistoj sin prezenti! Partoprenante en la festivalo kaj laŭeble en la trajna karavano junaj esperantistoj havos okazon ĝui vere internacian etoson kaj samtempe fari valoran informan laboron pri la internacia lingvo.

La Laborgrupo Junulargastejoj de NEJ, kiu prenis la taskon kunordigi la Esperantan agadon rilate al la festivalo, volas ricevi viajn reagojn, demandojn, proponojn ktp. Ĝia adreso estas ĉe: Hiddo Velsink, Nwe. Plantage 7, 2611 XH Delft, Nederlando

NOVA ELDONAĴO DE TEJO:

Kio estas NIEO?

FINE DE 1981 la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO eldonis sian plej novan libron. Tiu 67-paĝa kajero raportas pri la seminario (en majo/junio 1981, en Strasburgo), kiu traktis la temon: Nova Internacia Ekonomia Ordo (NIEO).

La ĉefa parto de la libro konsistas el resumoj de la prelegoj de R. Kingham kaj Vu Tu Hoa (ambaŭ pri: Kio estas NIEO?), Z. Metz (vidpunkto de la nealiancitaj landoj), B. Despiney (vidpunkto de socialismaj landoj), U. Bunjes (evolupedagogio) kaj resumoj de la laborgrupoj pri "Monda komerco kaj transigo de teknologio" kaj "Multnaciaj konzernoj en la Tria Mondo". Enestas ankaŭ prezento de pedagogia planludo, kiun ludis la seminarianoj.

Aperas, krome, resumoj de la postprelegaj diskutoj. Fine listiĝas la decidoj faritaj de la seminarianoj por daŭrigi la agadon rilate al NIEO. La libro havas plurajn utilajn aldonojn. Certe interesaj por esperantistaj ekonomikistoj kaj triamondistoj estas fakterminaro pri Nova Internacia Ekonomia Ordo kaj bibliografio de libroj pri tiu temo. La bibliografio mencias librojn en la angla, pola, franca kaj germana lingvoj. Aparta aldono klarigas kio estas la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO kaj kio estas ĝia laboro. *Monda Ekonomio* estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 6,00 gld.

DENOVE ESTAS HAVEBLA ĈI TIU POPULARA LERNOLIBRO!

Ĉu vi parolas tendare?, de Renato Corsetti kaj Mauro la Torre. Roterdamo/Sarajevo: TEJO/Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1980 (3a eld., fotoreprese). 64+27p. Ilus. 20cm. Prezo: 5,10 gld. Triona rabato ĉe la Libroservo de UEA ekde minimume 3 ekzempleroj.

38a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO de TEJO, 1982 07 31 – 08 07, Leuven (Belgio)

Adreso: 38a IJK, Duisburgsestraat 12, B-3030 Leuven-Heverlee, Belgio

Pĉk. por IJK

POŜTĈEKKONTO por Internacia Junulara Kongreso – tiel oni deĉifras la titolajn mallongigojn ĉi-supre. Tio signifas, ke la partoprenontoj de la ĉi-jara kaj estontaj TEJO-kongresoj nun povas pagi siajn kotizojn al speciala konto, anstataŭ la ĝisnuna praktiko sendi ĉion al unu el la kontoj de UEA mem. La numero de la nova konto ĉe la nederlanda poŝto estas: **15 72 212 – Internacia Junulara Kongreso.**

Kiel ni jam anoncis en nia januara numero, ĝis la fino de aprilo 1982 validas jenaj aliĝkotizoj por la 38a IJK: por gejunuloj ĝis inkluzive 20-jaraj – 230 gld.; 21–25-jaraj – 260 gld.; 26–33-jaraj – 300 gld.; pli aĝaj – 330 gld. Vi devus scii ankaŭ, ke la individuaj membroj de TEJO ĝuas rabaton de 30 gld. Kiel kutime, la supraj kotizoj inkluzivas ankaŭ la restadon dum la semajno.

Ni ne povas ankoraŭ diri kiom da homoj aliĝis al la 38a IJK sed tiu nombro tre verŝajne baldaŭ atingos centon, kio estas kontentiga por tiel frua antaŭkongresa tempo.

Loke

Britio

• Londona Esperanto-Klubo, kiu en 1983 festos 90-jaran ekziston kaj agadon, ankoraŭ apartenas al la plej viglaj lokaj movadaj grupoj. Post tre sukcesa partopreno en granda ekspozicio meze de la pasinta jaro (tie disdoniĝis pluraj miloj da enkondukaj Esperanto-lecionoj), nun ĉ. 800 personoj partoprenas senpagan korespondan kurson de la Internacia Lingvo. La Klubo, kies historio ĵus aperis libroforme (*Londono vokas*, de Harry Holmes; 15,00 gld), ĉi-jare havas 159 membrojn.

Brazilo

• Esperanto-Klubo en Sorocaba jarkunvenis la 6an de decembro en ĉeesto de ĉ. 200 personoj. Okaze de la jarkunveno estis organizita nacilingva konkurso, kies plej bonaj verkaĵoj aperos en la vaste legata *Gazeta Esportiva*.

Islando

• En Rejkjaviko kaj Akureyri, du plej grandaj urboj en Islando, okazas Esperanto-kursoj en la tieaj gimnazioj. En la rejkjavika gimnazio funkcias aparta kurso por la progresintoj.

• **Jugoslavio: Inter la 29a kaj 31a de januaro en Zagreb okazis Internacia Scienca Simpozio pri "Monda Komunika Ordo kaj Lingvaj Problemoj de la Evolulandoj". Prelegis ankaŭ d-ro R. Corsetti, vicprezidanto de UEA. Honore al li, s-ro Nikola Šegota, vicprezidanto de la Parlamento de Kroatio, okazigis solenan vespermanĝon, kiun partoprenis ankaŭ kelkaj aliaj gravuloj de la kroatia ĉefurbo.**

Fake

Turismo

• Sekve de la rezolucio de la Monda Turisma Konferenco en Manilo en 1980 kaj ĝia favora mencio de Esperanto, Aŭstralia Turisma Komisiono ĵus eldonis grandan koloran faldfolion en la Internacia Lingvo. Tiu bela informilo estas senpage ricevebla ĉe la eksterlandaj oficejoj de: Australian Tourist Commission, en: Usono (P.O. Box A-1, Addison, IL 60101), Japanio (Sankaido Building 7F, 9-13, Akasaka 1-chome, Minato-ku, Tokio 107), FR Germanio (Neue Mainzerstr. 22, D-6000 Frankfurt 1) kaj Britio (29 Old Bond St., London W1X 4PL). Unuopuloj povas peti la informilon ankaŭ ĉe la aŭstraliaj ambasadoj. Grandajn kvantojn oni mendu ĉe Aŭstralia Esperanto-Asocio (P.O. Box 48, Jamison Centre, Canberra, ACT 2614).

• **Soveta Unio: Vladivostoka Esperanto-Klubo, en la plej fora oriento de Soveta Unio, havis en decembro grandan publikan solenaĵon (kun pli ol 100 gastoj), por festi ne nur la Zamenhofan Tagon sed ankaŭ 90 jarojn de la loka Esperanto-movado. Okazis prelego, arta programo kaj ekspozicio de Esperanto-libroj.**

Lernolibroj

• La kleriga ministerio de Estonio eldonis duafoje lastatempe lernolibron de Esperanto. Temas ĉi-foje pri *Esperanto-kurso por foresta lernado,* kiun verkis Boris Kolker kaj Jaan Ojalo. La libro aperis en du mil ekzempleroj kaj estis dissendita al ĉiuj distriktaj klerigaj fakoj en ĉi tiu soveta respubliko. Fine de ĉi tiu jaro oni atendas plian estonan libron en Esperanto – *Estona panoramo 82,* kiu provos prezenti superrigardon pri la historio, ekonomio, kulturo, arto, sporto kaj aliaj vivaspektoj de Estonio.

Periodaĵoj

• *Scienca revuo* spertis multajn problemojn kaj ne aperis dum pluraj jaroj. Nun ŝajnas, ke la malfacilaĵoj estas solvitaj, ĉar lastatempe aperis du numeroj de la jarkolekto 1979. La abonprezoj ĉe la Libroservo de UEA estas: por 1979 – 22,00 guldenoj, por 1980 – 28,00 gld., por 1981 – ankaŭ 28,00 gld.

Delegitoj

• Kion faras la delegitoj de UEA, krom aperi en la Jarlibro? Se juĝi laŭ tradicia enketo farita en Francio, ili ja faras multon. En 1981 la delegitoj kaj fakdelegitoj en Francio ricevis 381 informpetojn, el kio 108 rilatis turismon, 78 profesian laboron, 40 filozofiajn demandojn, 45 filatelon, 8 radion, 38 estis korespondpetoj, kaj 64 traktis aliajn temojn. 32 francaj delegitoj akceptis 95 eksterlandajn gastojn; 37 delegitoj gvidis Esperanto-kursojn, kaj 11 aranĝis ekspoziciojn; pluraj delegitoj plenumis movadajn taskojn je la landa aŭ internacia nivelo.

Instruado

• En Teramo (Italio) jam de kelkaj jaroj okazas lernejaj kursoj de Esperanto por geinstruistoj. D-rino Lina Gabrielli, konata movada eldonisto kaj verkisto, informas, ke en la lerneja jaro 1981/82 la kursojn partoprenas 100 geinstruistoj. Pro akcidento, kiun d-rino Gabrielli spertis antaŭ nelonge, ŝi mem provizore ne povas gvidi la kursojn, kaj la taskon transprenis prof. G. Maraglino.

Muziko

• Partoprenintoj de la 65a UK en Stokholmo ankoraŭ memoras la debuton de malgranda internacia koruso, kiun tie organizis la bulgara muzikisto Dimitar Terziev (str. Milin Kamak 58, Sofia 21, Bulgario). S-ro Terziev planas denove prepari prezentiĝon de la koruso dum la 67a UK en Antverpeno. Interesitoj estas petataj skribi al la ĉi-supre indikita adreso.

Universitatoj

• Meze de 1981, en la Universitato de Vilnius (Litovio, Soveta Unio), L. Straĵnickas diplomiĝis pri filologio per temo, kiu rilatas la Internacian Lingvon. La titolo de tiu diplomlaboro, preparita sub la gvido de la docento A. Skupas, estas: "Tipologio de kelkaj lingvistikaj fenomenoj en la lingvoj litova, franca kaj Esperanto". En la studo aperas resumo en la Internacia Lingvo, kiu triafoje rolas kiel diplomtemo en la Universitato de Vilnius.

Radio

• Laŭ Georges Larglantier, redaktoro de nia radio-rubriko, en 1981 okazis 3 074 radioelsendoj en Esperanto. La programojn disaŭdigis 12 stacioj en 11 landoj. La daŭro de ĉiuj programoj kune estis 1 315 horoj. Kaj la nombron kaj la daŭron de la programoj oni unuavice dankas al Pekino kaj Varsovio (po 1 095 elsendoj kaj 547,5 horoj).

Geografio

• E. Ŝvarcaite (Vilnius, Litovio, Soveta Unio), membro de la internacia komisiono pri geografia terminologio de Internacia Asocio de Geografoj, partoprenas la ellaboron de granda plurlingva vortaro de geografiaj terminoj. La vortaro, kiun la Asocio planas eldoni en 1984, havos – ŝajne – ankaŭ Esperantan sekcion, kiun kompilas s-ro Ŝvarcaite.

Persone

Muller

• S-ro Robert Muller, kiu antaŭ tri jaroj gastprelegis en la inaŭguro de la 64a Universala Kongreso en Lucerno, estas nomita kiel asista Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj. S-ro Muller jam plurfoje montris informitecon pri la monda

lingvo-problemo kaj simpation por la streboj de la Esperanto-movado (v. ekz. la tekston de lia parolado en Lucerno en nia numero de sept. 1979, p. 143). D-ro Tonkin, estrarano pri eksteraj rilatoj, sendis al s-ro Muller bondezirojn nome de UEA.

Migliorini

• D-ro Elio Migliorini, emerita universitata profesoro pri geografio, festas ĉi-jare nekutiman movadan jubileon: 60-jaran servon en la Delegita Reto de UEA. Li estis delegito unue en Romo, poste en Napolo, kaj denove en Romo. D-ro Migliorini estas aŭtoro i.a. de la populara *Esperanta legolibro,* kiu ĝis nun havis kvin eldonojn.

Neergaard

• La 19an de februaro 1982, prof. Paul Neergaard, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, fariĝis 75-jara. Fine de februaro li emeritiĝis kiel direktoro de la Dana Ŝtata Instituto de Sempatologio por Evolulandoj, Kopenhago. Tamen, prof. Neergaard restos ligita al la Instituto kiel gvida sciencisto. En septembro 1982 prof. Neergaard pasigis tutan monaton en Brazilo, kiel konsilanto al Interamerika Agrikultura Organizaĵo. En oktobro ĉi-jare en Kopenhago okazos Internacia Simpozio de Sempatologio honore al prof. Neergaard. La sciencaj traktaĵoj de tiu simpozio aperos en 1983 kiel festa volumo dediĉita al prof. Neergaard, kiu estas mondfama sur ĉi tiu scienca kampo.

Oficiala Informilo

N-ro 551

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Francio: E. Vaneau. FR Germanio: A. Bepperling. Japanio: H. Nakada.

SOCIETO ZAMENHOF 1981

ITAL: 210 Clara Gubbioli Carioli.

SOCIETO ZAMENHOF 1982

Argentino: Rodolfo G. Calógero. **Aŭstralio:** Tim A. Einihovici; L.V. Scott; Margaret M. Chaldecott. **Aŭstrio:** Grete Breunlich. **Belgio:** Cesar Vanbiervliet; E. Ernst; E.L.M. Wensing; G. Wolff; Léa Bernaerts-Toussaint; Clara Peeters. **Brazilo:** Denisa A. Deslandes; Murillo C. de A. Fraenkel; Délio P. de Souza; Elvira Fontes; Francisco de S. Almada; Jair R. P. Laguna; José Dias Pinto; Marija Pozder Almada; Alvaro Rabêlo; A. de S. Barbosa; Wilson Deslandes. **Britio:** John Brownlee. **Danlando:** Ejnar Hansen; Johannes B. Pedersen; P.O.P. Andersen. **Finnlando:** Aarne Ratalahti; Irja Klemola; Liisi Oterma; Touko Tähtinen; Veikko Tikkanen; Vuokko T. Heinäsuo. **Francio:** François Lo Jacomo; Gaston Waringhien; Henri Dabezies; Jack-André Rousseau; Jean-Paul Beau. **FR Germanio:** Louis Beaucaire; Harry Bily; Bruno Vogelmann; Ellen Eggers; Elise J.F. Woller; Erdmann Fritsch; Martin Gründler; Heinz Schindler; Helene Hiebel; Hans Schütt; Julie Winter; Marie Laade; Richard Schulz; Werner Heinrich. **Hispanio:** Ramón Molera Pedrals. **Italio:** Adelaide Casetta. **Japanio:** Sin'itirô Kawamura; Koiĉi Ŝimizu; Takeo Sugano; Syozi Hosonuma; Tosihide Kuwuhara; Kôzô Ueda. **Jugoslavio:** Jožica Židanik. **Kanado:** Dorothy M. Hawley; Edward W. Woodruff; W.G. Du Temple; Olga Du Temple; Betty Salt; Thomas M. Hess. **Luksemburgo:** B.R. Moon. **Nederlando:** C. Mook van der Laan; Cornelia J. Knoop; G.C.A.M. Dercks; E.J. Woessink; Els Kervers-van Tholen; Gerard Peet; H.M. Butter; Ingeborg M.J. Dijkhoff-Lenze; Louise Adelaar; H.C. Luyke; Truus Mantingh; Elsa S. Otto; S.A.K. van der Zee; Akiko Ŭusink-Nagata; Simon P. Smits; W.H. Mook; W.A. Verloren van Themaat; H.H. Weulen Kranenberg; W. Rodenhuis; G.H.M. Wulfers; C.B. Zondervan. **Nikaragvo:** Julie L. Regal. **Norvegio:** Agnete Anjer; Ludvig Anjer. **Nov-Zelando:** D.J. Langman. **Svedio:** Åke Blomberg; Anna Ericson; Barbro Karlsson; Bertil Bengtsson; Brita Nylén; Gunnar Börjesson; Bror Lindström; David Kullberg; Edla Nilsson; Einar Rasmussen; Elna Jansson; Elly Persson; Folke Pettersson; Gustav Nygård; Karl E. Gustafsson; Harald Andersson; Henrik Karlsson; Jan-Olof Svensson; Leif Holmlund; Lilian Kullenberg; Olle Olsson; Olle Persson; Ragnar Hjorth; Sten Svenonius; Tore Johansson. **Svislando:** Otto Walder. **Usono:** Armin F. Doneis Jr.; Frederik J. Belinfante; Bruce Arne Sherwood; Daniel L. Mason; Humphrey Tonkin; Ken Thomson; E. James Liebermann; L.A. Walther; Margaret L. Barkley; Moshe Lewin; James Parkerson; Rose Norlund; Robert A. Swenson; William Solzbacher; Mark Starr; Douglas B. Swett; Victor Palermo; William R. Harmon; William H. Schulze; W. Campbell Nelson. **Venezuelo:** Carlos Levay.

Entute ĝis nun 139 membroj.

DONACOJ 1982 (Gld.) ĝis la 31a de januaro

ASOCIA KAPITALO: Nederlando: H. Veenstra 3 500,00.
FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Diversaj malgrandaj 4,42.
FONDAĴO CANUTO: Nederlando: A.J. Middelkoop 25,00; S. van Wijngaarden 100,00; F. Zeiler 62,50. Svedio: A. Brenander 69,41. Svislando: A. Baur 140,00. Sumo ĉi-jara 396,91.
FONDAĴO TEJO: Diversaj malgrandaj 1,50.

7% POR FIKSDATAJ DEPONOJ

Daŭre kreskas la monsumo, kiun membroj de UEA ŝparas en la formo de fiksdataj deponoj: nun jam pli ol 120 000 gld. Bona novaĵo estas, ke plialtiĝis la rento de 6% al 7% por ĉiuj novaj deponoj ekde la 1-a de februaro 1982. Malnovaj deponoj aŭtomate transiros al la nova procentaĵo okaze de renovigo, t.e. je la fino de la antaŭa deponperiodo.

ĜENERALA KASO: Finnlando: Yrjö Hiltunen 24,60; T. Sormunen 115,00. Francio: R. Lemaire 57,98. Nederlando: R. Bossong 12,50; W. Derks 37,52. Nov-Zelando: J. Wilson 71,49. Usono: E.H. Thompson 176,96. Diversaj malgrandaj 8,35. Sumo ĉi-jara 504,40.
PATRONOJ DE TEJO: 1 E. Kehlet, Belgio. 2 A. Fighiera-Sikorska, Hispanio. 3 H. van Leeuwen, Nederlando. 4 H. Eklund, Svedio. 5 S. De Weerd, Belgio. 6 Abdul Aziz Athari, Irano. 7 P. Zlatnar, Jugoslavio. 8 R. Vetter, Nederlando. 9 L. Anjer, Norvegio. 10 G. Becker, FR Germanio. 11 J. Hartl, Aŭstrio. 12 A. Mechelynck, Belgio. 13 J.P.R. Palfrey, Britio. 14 M. Jullien, Francio. 15 J.Rabino, Israelo. 16 J. Tilleman, Israelo. 17 H. Takagishi, Japanio. 18 K. Hamada, Japanio. 19 B. Isizaki, Japanio. 20 S. Koga, Japanio. 21 J.C. Heetkamp-Senstius, Nederlando. 22 M. Meijwes, Nederlando. 23 F.E. Swift, Nov-Zelando. 24 D.J. Langman, Nov-Zelando. 25 A. Eder, FR Germanio. 26 U.J. Moritz, FR Germanio. 27 S. Martina, Italio. 28 H. Hukumoto, Japanio. 29 Antonio de S. Barbosa, Brazilo. 30 R. Triolle, Francio. 31 Conny Ch. M. Tan, Nederlando. 32 F.J. Pieterson-Kruger, Nederlando. 33 J.A. Pinto de Sousa, Nederlando. 34 J. Wilson, Nov-Zelando.
PROPAGANDA KONTO: Japanio: Hiroo Kodama 33,74.

Al ĉiuj tre koran dankon! **UEA**

Ĉu vi ankoraŭ ne abonis?
ABONU NUN!
Jarabono US $10 (12 numeroj)

Adreso: 7008 Millwood Road, Bethesda, Maryland 20034, Usono

Abonebla ĉe UEA: 25,00 gld.
Provekzemplero 2 irk.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,85 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj ne respondecas la redakcio.

Sociologio. En la Nederlanda Esperanto-Domo troviĝas la arkivo de la Internacia Komisiono Esperanto kaj Sociologio kiel parto de la arkivo de ANSE. Esperantistoj-sociologoj, kiuj volas revivigi la Internacian Komisionon Esperanto kaj Sociologio, bonvolu kontakti la Nederlandan Esperanto-Domon (Riouwstraat 172, 2585 HW 's Gravenhage, telefono 070-556677) por studi tiun arkivon.

Junaj novgeedzoj Tarducci vojaĝos al Eŭropo. Korespondu: España 945, RA-2600 Venado Tuerto, Argentino.

Sergio (11-jara) kaj Claudia (13-jara) Moyano, San Lorenzo 878, RA-1682 Villa Bosch (Argentino), tutmonde interŝanĝas kun gesamaĝuloj bildkartojn.

Interŝanĝu Esperanto-librojn! Sendu liston: A. Hrynkiewicz, San Carlos 1755, RA-1676 Santos Lugares (Argentino).

Kiu povas helpi min kompletigi la kolekton de la pariza revuo *La Movado* (1909 - 1933)? R. Molera, Moià (Barcelona), Hispanio.

Mi deziras korespondi tutmonde kaj interŝanĝi etikedojn de vino, volonte kun francoj. Mi interesiĝas pri historio, natura protektado, junularaj unuiĝoj kaj kultura historio de vino. Mi havas 39 jarojn. Poul Kry Poulsen, Benløseparken 19, 1 th, DK-4100 Ringsted, Danlando.

Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado – la revuo de CED – havas novajn abonprezojn: individua abonanto pagas 40,00 gld. por la abono de unu volumo; institucio/organizaĵo pagas 64,00 gld. por la samo. Kiel por aliaj abonoj, la nederlandaj klientoj pagas ankaŭ la imposton de 4%. **La revuo aperas regule, kaj la Libroservo de UEA nun akceptas abonojn por la volumo 6 (1982).**

Senpage vi ricevas ekzempleron de *La migranto,* riĉe ilustrita revuo pri turismo, naturbelaĵoj, ekologio, naturprotektado. Skribu al: Liesel Nagel, Moosgrund 8, D-7800 Freiburg, FR Germanio.

Korespondas tutmonde: Anton Face, Caixa Postal 6794, Curitiba - Paraná, Brazilo.

Malfermu ŝparkonton! Jam pli ol 120 000 guldenojn deponis membroj de UEA en fiksdatajn ŝparkontojn ĉe la Centra Oficejo. Ili gajnas renton de 6% jare kaj samtempe helpas la Asocion. Novaj kaj renovigotaj deponoj ekde 1982 02 01 ĝuas renton de 7%. Petu pliajn informojn de la Centra Oficejo de UEA.

Investu iom da mono en Esperanto-Domo. Rento 9%jare. *Semajna bulteno* jam ekzistas. Abonu ankaŭ vi. Informas: Esperanto-Domo Aarhus, Banegårdsgade 19, DK-8000 Aarhus C, Danlando.

Letervesperon, la 24an de aprilo, okazigos Esperanto-grupo en Frankfurt/O. Ni atendas leterojn kaj bildkartojn el la tuta mondo, kaj ni reciprokos per bele afrankita respondo. Skribu al: Esperanto-Asocio en KL, Subdistrikta Estraro, K.-Liebknecht-Str. 37, DDR-1200 Frankfurt/Oder, Germana Dem. Respubl.

Interŝanĝas Esperanto-librojn kaj poŝtmarkojn s-ro Wu Lingun, Guizhou-Aluminium Mill, 550212 Xiuwen-Aluminium Mine, Ĉinio.

33-jara svedo, komencanto, deziras korespondajn kontaktojn kun sinjoroj kaj sinjorinoj. Interesoj: muziko, bestoprotektado, vegetarismo, filatelo kaj medio. Kjell Randehed, Domareg. 11C, S-252 59 Helsingborg, Svedio.

Disko/kasedo *Tra l' mondo* de Olivier Tzaut kaj nova disko/kasedo *Karnavaleto* aĉeteblas ĉe Olivier Tzaut, Arêtes 7, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Pĉk. 23-3656 La Chaux-de-Fonds. Oni mendu skribante sur la ĉekkuponon la deziratan objekton. Prezo (sendokostoj inkluzivitaj): disko: 24 sv.fr. Kasedo: 20 sv. fr. Vendas ankaŭ UEA.

Dua seminario pri informado okazos en la Centra Oficejo en Roterdamo, de la 7a ĝis la 9a de majo 1982. La programo, labormetodoj kaj loĝigaj aranĝoj similos al tiuj de la unua seminario en oktobro 1981. Interesitoj petu aliĝilon/informilon de la Centra Oficejo de UEA.

Volapük-literaturo serĉata. Ofertojn al: SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Lernanto deziras korespondi: s-ro Javed Hussain Baloch, M.C.B., Katchery Rd., Sargodha, Pakistano.

Kun kantistoj-esperantistoj deziras kontaktiĝi 22-jara studento: Nikolaj Bojaĝiev, Rakitovo, okr. Pazarĝiŝki, Bulgario.

Teknikisto volas korespondi pri diversaj temoj kaj interŝanĝi bk. kaj pm.: s-ro J.V. Haering, Hlavní 64, CS-252 07 Štěchovice, Ĉeĥoslovakio.

Komencanto deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj: Wellington Garcia, Av. N.S. da Penha 531/201, Penha, BR-21070 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

70 gelernantoj (14–17-jaraj) atendas korespondaĵojn el la tuta mondo. Adreso:Gimnazio "9a de Septembro", Esperanto-Grupo, PK 61, BG-5180 Polski Trambeŝ, Bulgario.

Pri internacia pacdevigo volas korespondi John C. Lincoln, 3320 East Weldon, Phoenix, Arizona 85018, Usono.

"La verko plej grava, kiu aperis en kaj pri Esperanto dum la pasintaj dekoj da jaroj." (T.P., Britio.) Prezo: 21 francaj frankoj. Ligue Française "Pro Unesco" (24 ave. de Riedisheim, F-68100 Mulhouse). Poŝtĉekkonto 16.233.37 C Paris.

Denaske nefranclingvanoj iam en kabaredo(j) aŭdintaj Raymond Schwartz bonvolu ekrilati kun Marie-Thérèse Lloancy, 5 rue Léonard Constant, F-64000 Pau, Francujo.

La legenda heroo Brabo ĵetas manon de giganto por doni nomon al la urbo de la 67a UK. Nia glumarko aperas pli malfrue ol kutime sed kompense kostas pli malmulte: po 6,00 (por Nederlando 6,86) guldenoj por cent brilarĝentaj memgluaj markoj sur vakspapero, inkluzive sendokostojn. Mendu!

Subtenu la tutmondigon de Esperanto per donaco al la Fondaĵo Azio-Afriko ĉe la CO de UEA

fondaĵo Azio-Afriko

NIKOLAJ RYTJKOV

DEK OK MAJSTROVERKOJ (DE ŜEKSPIRO ĜIS AULD) EN MAJSTRA INTERPRETO DE GRANDA AKTORO. SUR GRANDFORMATA DISKO (24,00 GLD) AŬ SUR KASETO (21,00 GLD). MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA!

Elektitaj Eroj

"Niaj grup-kunvenoj estas tedaj, tial mi ne plu vizitas ilin." Certe vi konas tiajn kaj similajn plendojn. Nu, vi ja ne tuj devas fondi — kiel oni faris en japana urbo Nagojo — monatan rondon AMIKARO DE MONATO, sed ankaŭ vi povas profiti el la riĉa materialo, kiun enhavas MONATO, por vigligi viajn kunvenojn. Neniam mankos temoj por priparoli, diskuti, aktiviĝi.

Se ankaŭ vi volas savi viajn grup-kunvenojn, petu varb-materialon ĉe: Eldonejo TK/Stafeto, Miksebaan 65 A, B-3130 Brasschaat, Belgio.

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj plus poŝkalendaro jare. Jarabono 59,50 gmk aŭ 960 bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA (64,00 gld.; por Nederlando 66,56 gld.). Petu provekzempleron kontraŭ du int. respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)

Ni decidis NE REKLAMI ĉi-foje la libron
PLENA ANALIZA GRAMATIKO
ĉar ĝi vendiĝas tiel bone, ke vi baldaŭ devos atendi ĝian represon aŭ novan eldonon por akiri vian ekzempleron. Pripensu, do!

Tutmonda Esperantista Adresaro 1981/(1982)

Enhavante ĉ. 2700 adresojn (kun indikoj pri naskiĝjaro, profesio, hobioj, grado de E-scio, deziro korespondi, preteco gastigi) el ĉ. 60 landoj, ĝi estas **la plej ampleksa esperantista adresaro**. Tuj mendu ĝin ĉe via kutima libroservo aŭ ĉe Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio. Prezo tie: 6,60 gmk. + sendokostoj.

John Wells: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Klara kaj klera scienca analizo, laŭ la moderna lingvistiko, de la Internacia Lingvo. Nemalhavebla por la serioza esperantisto! Enkonduko • Fonetiko • Morfologio • Sintakso • Leksiko kaj semantiko • Fonetikaj simboloj • Bibliografio • Indekso de terminoj. Prezo: 12,00 guldenoj.

ROMULO GALLEGOS:

DOÑA BÁRBARA

fama sudamerika romano en la traduko de F. de Diego. Caracas: VEA, 1975. ISBN 84 399 2885 8. 16,20 gld.

UEA estas nun la ĉefdistribuanto de la Esperanta eldono.

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia arta prozo kaj riĉigis nian lingvon per libro kies ĝuado en Esperanto ne estas sub tiu de la legado en la hispanlingva originalo. Kelkloke la estetika ĝuo estas pli diafana kaj senpera en la tradukita teksto, ol en la originala, dank' al la bravura manipulado de la latentaĵoj en Esperanto kaj al la suverena agordado de ĉi ties esprimrimedoj." Juan Régulo

La Amo-Serio

1 *Japanaj fabeloj*, 70 paĝoj, 6,60 guldenoj
2 *Ĉeĥaj fabeloj*, 74 paĝoj, 10,50 guldenoj
3 *Japanaj malnovaj rakontoj*, 127 paĝoj, 10,20 guldenoj
4 *Poezia bukedo por geknaboj de la mondo*, Bertram Potts, 102 paĝoj, 16,20 guldenoj

Ankaŭ havebla: *Japana kantaro*, 41 kantoj kun muziknotoj, 64 paĝoj, 3,30 guldenoj



Ĉiu libro de la "Amo-Serio" enhavas belajn kolorajn ilustraĵojn. Ideala legaĵo por la plej junaj esperantistoj – sed ne nur por ili! Mendu ĉe Amo-Akademio, Tenmori, Kamisdami, Moriyama, Nagoya, 463 Japanujo.

ELDONEJO MOUTON
Filio de Walter de Gruyter & K-io
anoncas la aperon de la anglalingva verko

THE ESPERANTO MOVEMENT

de
D-ro Peter Glover Forster

Ĉi tiu bonega libro estis antaŭrecenzita jene:

"... de la plej alta scienca nivelo... ĝenerala sociologia verko pri Esperanto kaj ties historio... ĝi fariĝos normiga verko sur sia kampo." **V.G. Pons, profesoro pri sociologio, Universitato de Hull, Britio.**

"Ĝi estas. . . ne nur unika sed ankaŭ tre bone farita, ĝisfunda kaj stimula. . . pionira kaj bone verkita. Ĉi tio estas la unua studo de la monda movado ĝenerale. . ." **Prof. Joshua A. Fishman, Universitato Yeshiva, Nov-Jorko.**

". . . Mi havas altan opinion pri ĉi tiu libro. Ĝi alportas enrigardojn . . . de speciala intereso por la membraro de la Esperanto-movado." **D-ro Ulrich Lins, DAA, Tokio.**

THE ESPERANTO MOVEMENT, Peter G. Forster. Hago/Nov-Jorko/Berlino: Mouton/Walter de Gruyter, 1982. XIV+413p. 23cm. ISBN 90 279 3399 5. Prezo: DM 30,00 (33,90 gld).

Viajn mendojn sendu rekte al: **Walter de Gruyter & Co. Postfach 11 02 40, D-1000 Berlin 11** aŭ al: **Liboservo de UEA, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.**

KSM

Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la Koresponda Servo Mondskala de UEA. Adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.

TURISTA VOJAĜO EN SUDA NORVEGUJO somere 1982 (28/6 – 3/7)

Turisma Servo de Norvega Esperantista Ligo planas turistan vojaĝon por esperantistoj tra la plej belaj partoj de suda Norvegujo, inter la 28a de junio kaj la 3a de julio 1982. Ekiro el Oslo, vizito i.a. al dometo de fama verkisto Knut Hamsun kaj fostopreĝejo de Lom, fjordo de Geiranger, al glaciejo, famaj akvofaloj ktp.

La prezo por la tuta vojaĝo estas 2600 norv. kronoj. Necesas minimume 20 aliĝintoj. Por pliaj detaloj skribu al: Turisma Servo de NEL, Olof Schous vei 18, Oslo 5, Norv.

NOVA ANTOLOGIO

34 noveloj de modernaj kroatiaj verkistoj. 604p. Tole bindita. 20x15cm. Prezo: 58,50 guldenoj.

Eldonis: Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio, kaj Edistudio, Pizo, Italujo.